

1973 junio

6-a jaro


n-ro 810 (6)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



FULMATAKO EN LONDONO

Eksciinte el gazetoj, la 11an de majo, ke okazas en Londono "Kongreso de Eŭropo" kun mil partoprenantoj diverslandaj, grupo da londonanoj tuj lanĉis fulmagadon por atentigi pri Esperanto. Ĉi-supre: Ian Fantom, ŝargito pri la gazetara servo de Brita Esperantista Asocio, enmanigas seslingvan informfolion al unu el la delegitoj ekster la kongresejo Guildhall, kie Zamenhof faris faman paroladon en 1907. Pliajn detalojn vidu sur la interna kovrila paĝo de ĉi tiu numero.

Enhavo

- 101 La Estraro en Rotterdam
- 102 Kapitalo Hodler 68 transpasis 150 000 guldenojn
- 102 Naci-skala opinio-sondo en Francujo
- 103 Nova sukceso en la skolita movado
- 103 Universitato nun seslingva
- 103 Internaciaj kursoj en Portugalujo
- 103 Premo por la ĉina
- 104 Adiaŭ Raymond Schwartz (Bernard)
- 104 Popoleto en kvar regnoj (v. Herten)
- 106 La junularo aŭdigu sian voĉon (Lapenna)
- 108 Recenzoj
- 110 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj)
- 111 Leteroj de legantoj
- 112 Loke - Fake - Persone (mallongaj novaĵoj)
- 114 Nekrologoj: Fréchet, Baker, Mičová, Courtinat, Steffering, Linnuse
- 114 Informejo (Vi demandas — Ni respondas)
- 114 Kurioze
- 115 Komenco bona — ĉio bona
- 116 Decidu ankoraŭ por Beograd! (58a UK de Esperanto)
- 117 TEJO-Paĝo: la 29-a IJK
- 118 Oficiala informilo n-ro 468
- 119 Esperanto en radio
- 120 Anoncetoj

La kovrilo

Decidinte fari ĉion eblan por atentigi la Kongreson de Eŭropo (majo 11-13, en Londono) pri la lingva problemoj kaj ĝia solvo, kunvenis pluraj aktivuloj por organizi la agadon. Ili verkis specialan informilon en la formo de persona letero de la sekretario de BEA kaj tuj tradukigis ĝin en la francan, germanan, italan, nederlandan kaj danan. La letero atentigas pri la gravaj lingvaj problemoj en Eŭropo kaj precipe en eŭropa parlamento kaj invitas la leganton esprimi sian opinion pri la solvo pere de Esperanto. La grupo presigis la seslingvan leteron, distelefonis al la gazetaro, preparis slogantukon kaj afiŝon, havigis al si policpermeson por manifestacii, vizitis ĉefajn gazet-oficejojn kaj manifestaciis ekster la kongresejo — ĉio farita en nuraj du tagoj! La Kongreson ĉeestis multaj eminentaj "eŭropistoj", kaj alparolis ĝin la brita ĉefministro Edward Heath. La grava ĵurnalo "Guardian" en sia raporto pri la Kongreso dediĉis ankaŭ kvin liniojn al la manifestacio (vidu ĉi-sube), kies slogano estis "Ni volas komunan lingvon". Ankaŭ interne de la kongresejo estis disdonitaj la seslingvaj informleteroj.



esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. **Fondita** en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza afriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonc-tarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam, Nederlando.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA.

Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando.

Legantoj en 88 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, administrado kaj juraj aferoj: Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri scienco kaj tekniko: Prof. d-ro B. Popović, Ognjena Price 80, YU-11000 Beograd, Jugoslavio.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, PL-00-975 Warszawa 12, Poŝtkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London SW19 1QX, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

La Estraro en Rotterdam

Intensa laboretosoj kaj rapida solvado de granda nombro da tagordaj punktoj karakterizis la kunsidon de la Estraro de UEA, kiu okazis la 28an kaj 29an de aprilo en la Centra Oficejo en Rotterdam.

Nova disdivido de la taskoj

Bedaŭrinde unu estrarano — s-ro Uśpieński — devis rezigni pri partopreno; aliflanke ja ĉeestis la nove elektita vicprezidanto prof. Popović (pri kio vidu cetere la paĝon 118).

Prof. Popović, estante samtempe prezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj ĉefredaktoro de ĝia *Scienca Revuo*, havos en la Estraro de UEA, krom la laŭstatutaj taskoj de vicprezidanto, ankaŭ la funkcion "estrarano pri scienco kaj tekniko". Interalie li transprenos la rilatojn de UEA kun tiuj fakaj asocioj, kiuj havas sciencajn aŭ teknikajn karakteron, kaj ĝenerale dediĉos sin al progresigo de la lingvo en sciencaj kaj teknikaj medioj. Aliaj ŝanĝoj en la disdivido de taskoj en la Estraro estas la nomigo de estrarano pri juraj aferoj (prof. Lapenna). La prezidanto estas krome komisiita — kun helpo de s-ro Woessink — pri administraj demandoj.

Konfidenceco de la estraraj kunsidoj

Alia ŝanĝo rilate la laborsistemon de la Estraro estis pridiskutita kaj provizore decidita jam en la decembra kunsido sed poste modifita kaj finformulita per skriba voĉdono. Temas pri tio, ke ĝis nun la kunsidoj de la Komitato dum longa tempo estis publikaj, dum tiuj de la Estraro estis privataj. Sekve ankaŭ la protokoloj de la estraraj kunsidoj estis rigardataj kiel principe konfidencaj, kaj nur la ĉefaj decidoj, interesaj por la ĝenerala membraro, estis publikigitaj.

Bedaŭrinde tio kelkfoje havis la sekvon, ke okazis miskomprenoj aŭ eĉ misprezentoj pri la laboro de la Estraro aŭ de unuopaj estraranoj, sed ke ili mem — pro la principo de confidenceco — ne povis libere klarigi la aferojn tuŝitajn. Tial la Estraro nun decidis, unue ke ĉiuj ĝiaj decidoj estos komunikataj al la Komitato, due ke komitatano, kiu deziras scii pliajn detalojn pri iu punkto, povos ricevi la koncernan parton de la protokolo, kaj trie, ke ĉiu estrarano havas la rajton libere citi el la protokoloj aŭ aliaj dokumentoj rilatantaj al la laboro de la Estraro. Tio nur ne rilatas al aferoj eksplicite deklaritaj "konfidencaj".

La diskutoj pri financo en la aprila kunsido ne estis aparte longaj aŭ problemaj, sed la problemoj de inflacio en Nederlando kaj en la mondo ĝenerale estas dorno konstante pikanta en la buĝeton de UEA. Malgraŭ ĉiuj ŝparoj de la lastaj jaroj — en la nuna jaro ankaŭ per la ekspedo de la revuo kaj jarlibro el Belgujo, je tarifo multe malpli alta ol la nuntempa de la nederlanda PTT — la jaro 1972 finiĝis per deficito de iom pli ol 14 000 guldenoj. Al tio kontribuis ĉefe du faktoroj. Unuflanke la provizora

grava manko de oficistoj en 1972 signifis, ke la Centra Oficejo devis rifuzi preskaŭ ĉiujn ricevajn mendojn pri preslaboroj por eksteruloj en tiu jaro kaj sekve ne havis la antaŭviditan gajnon el tiu fonto. Aliflanke, pro la inflacio konsiderinde altiĝis la elspezoj por salajroj, asekuro kaj aliaj oficejaj kostoj, precipe afranko.

Helaj punktoj en la bildo pri 1972 estis la altiĝo de la membronombro — kaj sekve ankaŭ de la kotiz-enspezoj — kaj la neatendite bona gajno el la Kongreso en Portland (pli ol 16 000 gld.), kvankam tiu lasta ne influas la profiton aŭ deficiton de UEA mem.

Kotizaltigo proponota al la Komitato

Ĉiuj prognozoj kredigas, ke la inflacio de kostoj plu daŭros en la venontaj jaroj, paralele al tiu de salajroj, kaj pro tio la Estraro ne vidas alian eblecon, ol proponi al la Komitato altigon de la kotizoj por individuaj membroj je unu triono ekde 1974. Tio signifas, ke la kotizo por Membro-Abonanto devus altiĝi de 30 ĝis 40 guldenoj jare. Tamen, pro la lastatempaj gravaj kurzoŝanĝoj, la kotizoj en kelkaj valutoj (ekzemple dolaroj) devus altiĝi je pli ol 33%, dum en kelkaj aliaj la altiĝo estus malpli ol 33% (ekzemple en japanaj enoj kaj FR-germanaj markoj).

Grave kreskas la eldona aktiveco

La Estraro antaŭvidas gravan kreskon en la eldona aktiveco de la Asocio. Jam presata (en 4 000 ekz.) estas nova legolibro de A. Lienhardt *Amuzaj dialogoj*. Sekvos dua eldono de la speciala lernolibro por labortendaroj *Ĉu vi parolas tendare?* — eldonota sub la nomo de TEJO kun subvencio el la Eldona Fondaĵo de UEA. La artikolserio de prof. Lapenna *Por pli efika informado* aperos baldaŭ kiel aparta broŝuro. Jam grandparte kompostita estas la monumenta, ĉ. 600-paĝa verko *Esperanto en perspektivo — Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo*. Laŭ la interkonsento kun eldonejo TK (vidu la paĝon 118), UEA mem produktos la librojn *La granda kaldrono* de J. Francis kaj *Je la flanko de la Profeto* de I. Chiussi. Estrarano John Wells estas komisiita kunordigi kaj unuecigi la eldonon de novaj "Ŝlosiloj" de Esperanto, el kiuj jam preparataj estas novaj angla, kimra kaj nederlanda.

Fine, dank' al donaco de s-ro Torben Kehlet (Danlando), la Centra Oficejo ricevis malgrandformatan ofsetan presmaŝinon, kio signifas, ke baldaŭ por multaj negrandaj presaĵoj ĝi povos labori tute memstare ekde la kompostado ĝis la preta produkto.

Ĉi tie eblis nur plej koncize resumi kelkajn punktojn pritraktitajn en la lasta kunsido de la Estraro. Eĉ nur listigi la ceterajn punktojn postulus unu plian paĝon. Sufiĉu do diri, ke la kunsidon karakterizis ne nur la intensa laboro sed ankaŭ la harmonia etoso, kio estas nepre bonaŭgura por la estonta plenumo de la taskoj fiksataj.

V.S.

KAPITALO HODLER 68 TRANSPASIS 150 000 GULDENOJN!

La subvencioj 1973 estas jene asignitaj:

La internacia literatura/kultura revuo **NORDA PRISMO** (vidu Jarlibron 1972, II, p. 323) 1 650,— gld.;
Fondaĵo Prof. **CANUTO** (por 50 M.A. el netranspagipovaj landoj) 1 500,— gld.;
S.U.K., Lieĝo 1974, por stipendioj al 2 studentoj el netranspagipovaj landoj, (vidu "Esperanto", aprilo 1973, p. 72), 950,— gld.;
Societo por Internacia Lingvo, por eldono de la periodaĵo "Interlingvistika Informa Servo" en presita formo (vidu Jarlibron 1972, II, p. 321), 800,— gld.;
Skolta Esperantista Ligo, por nova eldono de disko/lernolibro "Ĵamborea Lingvo" (vidu Jarlibron 1972, II, p. 119, 161, 305 kaj "Esperanto", marto 1973, p. 57), 500,— gld.;
Fondaĵo **Enciklopedio**, (vidu "Esperanto" 1972, decembro, p. 206), 300,— gld.;
Kastora Klubo, (vidu Jarlibron 1972, II, p. 135), 100,— gld.
Ĉiu helpu pliampleksigi Kapitalon Hodler 68, ĉu per pruntoj de po 1 000,— gld. (ĉ. \$ 350,—, £ 145,—,

GM 1 000,—; 100 000,— jap. en. ktp) kun aŭ sen rento, je tempodaŭro de 10 aŭ 6 jaroj, ĉu per donacoj je kiu ajn sumo.

En 1972 Institucion Hodler 68 — la instancon, kiu mastrumas Kapitalon Hodler 68 — atingis i.a. jenaj belegaj donacoj: ges. Carlén, Svedujo 6 347,66 gld.; s-ino Betty Salt, Kanado 1 000,— gld.; s-ino H. v.d. Beek-Kelly, Nederlando 500,— gld. (ĉiujara donaco!); s-ro H. Veenstra, Nederlando 500,— gld.; s-ino D.M. Hawley, Kanado 325,— gld.; internacia Portland-karavano de UEA 750,— gld. Krome venis pluraj malpli grandaj sumoj. Ĉiu sumo estas tre bonvena. Multaj donacetoj faras donacegon kaj tiel rentetoj fariĝas rentego...!

Ĉiu mono pruntita aŭ donacita tuj komencas produkti novan monon. Tio okazis pere de investoj en obligacioj, akcioj, hipoteke, domo kaj ŝparkontoj. La kapitalo restas netuŝita. Nur la ĉiujara rento estas elspezata.

Institucio Hodler 68 estas fondaĵo kun jura personeco en Nederlando kaj kontrolata de profesia rekonita revizoro. Ĝia Estraro — nomita de la Estraro de UEA — konsistas el s-ro G. Maertens (Belgujo), komitatano de UEA, prezidanto; d-ro W. Bormann (F.R. Germanujo), estrarano de UEA, vic-prezidanto; s-ro E. Haverschmidt (Nederlando), notario, estrarano pri financoj.

Laŭstatute la Estraro ĉiujare en marto/aprilo decidas pri la subvencioj el la pasintjara gajno de la kapitalo. Instancoj, kiuj opinias, ke difinita iniciato aŭ celo (nepre de internacia graveco) meritas subvencion, bonvolu atenti tiun tempon por sendi sian — bone dokumentitan — peton. Ĉiujn pliajn informojn donas la administranto f-ino M.H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70, II, R, Rotterdam-3002.

VIDU ANKAŬ LA ALDONITAN FOLION EN TIU ĈI NUMERO!

Naci-skala opinio-sondo en Francujo

De februaro ĝis la 15a de julio 1973 okazas en Francujo naci-skala opinio-sondo organizita de Unuiĝo Franca por Esperanto. Volontuloj surstrate haltigas preterpasantojn, aŭ vizitas loĝantojn en iliaj domoj, kaj petas respondojn al la sekvantaj sep demandoj:

- 1) Ĉu vi jam aŭdis pri Esperanto?
- 2) Ĉu vi scias, ke ĉiujare ie en la mondo okazas Universala Esperanto-Kongreso?
- 3) Ĉu vi scias, ke en Parizo oni ludas esperantlingvajn teatraĵojn?
- 4) Ĉu vi scias, ke 19 Departementaj Konsilantaroj voĉdonis favore al instruado de Esperanto?
- 5) Ĉu vi scias, ke Esperanto estas pli facile lernebla, ol iu ajn alia lingvo?
- 6) Laŭ vi, kiu lingvo el la sekvantaj devus esti la lingvo de Eŭropa Ekonomia Komunumo kaj poste de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo? : Esperanto - franca - angla - germana.

7) Ĉu vi opinias, ke Esperanto devus esti elektebla lingvo en la Abiturienta Ekzameno?

Tiu opinio-sondo havas du celojn:

- 1) pli bone koni la opinion de ne-esperantistoj pri Esperanto, kaj sekve ebligi verkadon de pli efikaj reklamaĵoj;
- 2) provoki rektajn kontaktojn inter esperantistoj kaj ne-esperantistoj.

La rezultoj estos konataj nur post la fino de la opinio-sondo. Sed intertempe jam alvenis favoraj raportoj: la tiel establitaj kontaktoj estas tre fruktodonaj; la alparolitoj scivoliĝas, demandas pri Esperanto; kompreneble la enketistoj profitas el tio; ili klarigas, kio estas Esperanto, disdonas informilojn, komunikas la adreson de la loka Esperanto-grupo. Kiam eblas, ili notas la nomojn kaj adresojn de la demanditoj, kaj tiuj poste ricevos varb-materialon.

NOVA SUKCESO EN LA SKOLTA MOVADO



Pasintan jaron la Skolta Monda Oficejo en Ĝenevo lanĉis projekton por intensigi la kunlaboron inter diversnaciaj skoltoj, la "Skolta Interliga Programo" (angle: "World Scout Link Program").

Skolta Esperanto-Ligo protestis kontraŭ la enhavo de la programo, ĉar interŝanĝo de objektoj ne multe kontribuas al frateco, kaj por la resto de la programo oni bezonas la scion de fremdaj lingvoj. Tio signifas, ke la programo havas nur malgrandan valoron por la plej granda parto de la junuloj en la Skolta Movado.

Pro la kritiko de SEL la Skolta Monda Oficejo decidis akcepti Esperanton kiel oficialan parton de sia programo kaj aktive stimuli la skoltojn uzi aŭ lerni la internacian lingvon.

Krome oni dufoje mencias la laboron de SEL en la manlibro por internaciaj kampanjoj "Hello World" (Saluton, Mondo), kiu baldaŭ aperos.

La koncerna proگرامestro, kiu ricevis la skoltan lernolibron de Esperanto kun la aldona disko, esprimis en letero sian kontenton pri la enhavo kaj aspekto.

La afero tamen havas ankaŭ duan flankon, ĉar el la korespondo kun la Skolta Monda Oficejo montriĝis ankaŭ, ke oni decidis tre atente pristudi la valoron kaj utilon de la Internacia Lingvo dum la venonta Monda Ĵamboreo, kiu okazos en Norvegujo en aŭgusto 1975.

Pro tio SEL esperas, ke, pli forte ol iam antaŭe, la tuta Esperanto-Movado apogos kampanjon inter la skoltoj, ĝis minimume la decida momento en 1975. SEL fidas, ke sen ia aldono, ĉiu facile komprenos la signifon de ĉi tiu alvoko.

jkh.

Premo por la ĉina

Dum la lasta konferenco de Ekonomika Komisiono (de Unuiĝintaj Nacioj) por Azio kaj Ekstrem-Oriento en Tokio (aprilo 1973) la ĉina delegito proponis, ke ankaŭ la ĉina lingvo estu laborlingvo en tiu organizaĵo, kies laborlingvoj ĝis nun estas la angla kaj franca.

Dirante, ke li respektas la komencajn malfacilaĵojn, la delegito proponis duŝtupan planon, laŭ kiu oni komencu per samtempa tradukado kaj poste transiri al tradukado de ĉiuj dokumentoj kaj protokoloj en la ĉinan lingvon.

Universitato nun seslingva

La eŭropa universitato fondota de la Eŭropa Komunumaro en Firenze (Italujo) fariĝos seslingva. En 1971 la kulturministroj de la tiamaj ses ŝtatoj-membroj de E.K. proponis, ke ĝi uzu nur la anglan kaj francan lingvojn, sed posta rezisto de F.R. Germanujo ŝanĝis la decidon tiel, ke kvin lingvoj (angla, franca, germana, itala kaj nederlanda) fariĝos oficialaj. (Vidu la raporton en Esperanto, 1972, februaro, p. 21-22.)

Nun, post kiam ankaŭ Danlando aliĝis al la Komunumaro, ĝi decidis same tiel aliĝi ankaŭ al la eŭropa universitato, kaj la dana lingvo estos tie rekonita kiel sesa oficiala lingvo. Per tio estas amendita artikolo 27 de la konvencio de la 19a de aprilo 1972 pri la eŭropa universitato.

La pli fruaj propono kaj decido, kiuj klare diskriminaciis kontraŭ la dana lingvo, nun do malsukcesis, sed restas la demando, ĉu universitato kun ses oficialaj lingvoj povos funkcii efike kaj ekonomie...


Internaciaj kursoj en Portugalujo

En Portugalujo post la repermiso de Esperanto komencis revigliĝi la Esperanto-movado kiel jam menciite (*Esperanto*, n-ro 794, p. 22 kaj n-ro 799/800, p. 134).

La tutlande konata Centro de Elementa kaj Perfektiĝa Lingvo-instruado (Centro de Iniciação e Aperfeiçoamento de Línguas = CIAL), kiu organizas kursojn de diversaj lingvoj, sukcesis igi la koncernajn instancojn interesiĝi pri Esperanto-instruado kaj decidis okazigi Internaciajn Esperanto-Kursojn ĉijare (de la 2a ĝis la 11a de julio kaj de la 20a ĝis la 31a de aŭgusto) kaj, se ili sukcesos, ĉiujare.

Kiel la nomo de la kursoj montras, CIAL atendas kursanojn ne nur el Portugalujo sed ankaŭ el eksterlando, elektinte kiel la lokon por la kursoj la turisme konatan Vilamoura en la suda provinco Algarve. Informpetojn pri la kursoj kaj loĝado oni rekte sendu al CIAL, Centro de Línguas, Vilamoura, Algarve, Portugalujo.

Sur la strando de Vilamoura



Adiaŭ Raymond Schwartz

Raymond Schwartz (1894-1973)

Raymond Schwartz mortis la 14an de majo 1973, estante 79-jara. Dum unu tuta jaro li kruele suferis, kuŝante sur lito, kaj preskaŭ ne moviĝante, sed sub la konstanta ama prizorgado de la edzino kaj filino. Malgraŭ ŝajnigo de espero, li de la komenco konjektis kaj sciis, kien li iras. Tre ofte mi vizitis lin, kaj mi nur povas admiri liajn eksterordinarajn kuraĝon kaj stoikecon antaŭ la fiksita sorto. Li nun por ĉiam ripozas en tiu Lorena grundo, kiun li tiel amis, kaj al kiu li dum la lastaj dek monatoj tiel multe sopiris.


Kun Raymond Schwartz malaperas unu el la vere elstaraj tipoj de la Esperanto-movado. Plej humure sprita, sed neniam triviala, akrobato de la lingvo, el kiu li eltiris neatenditajn riĉojn, akra observanto de la homa naturo, eĉ en ĝiaj malfortaj punktoj, pacama

bonvivulo . . . li havis dank' al tiuj kvalitoj karieron escepte fekundan kaj unikan, senprecedentan kaj fakte ĝis nun neimititan. Oni ĉi tie povas nur resumi lian aktivecon. Fondinto kaj animinto de la du solaj Esperantaj kabaretoj, *La Verda Kato* (1920-1926) kaj *La Tri Koboldoj* (1949-1956), vizitataj kaj ŝatataj de la tuta Esperanta mondo, li publikigis du romanojn: *Anni kaj Montmartre* (1930) — simpla sed trafa rakonto de aventuro en Parizo, kaj la longan, densan, maturan *Kiel akvo de l'rivero* (1963) riĉan je simpatiaj homportretoj, kaj eŭrop-historie streĉan. Li publikigis ankaŭ du kolektojn de siaj kabaretaj verkoj: *La Verdkata Testamento* kaj *La ĝoja Podio*; krome kolektojn de siaj noveloj: *La stranga butikoj* kaj *Vole, novele . . .*, kaj ankaŭ ĵus la kolekton de siaj famaj *El mia Ridpunkto* sub la titolo *Kun siaspeca spico*. Regula kunlaboranto de

Ekstrakto el prelego farita en la
Esperanto-Klubo de Helsinki

ERIK V.
HERTZEN

POPOLETO EN



Pejzaĝo en Laponujo: kie arboj kaj homoj malabundas . . .


Laponoj, popolo vivanta en la Norda Eŭropo, sur la montaro de norda Skandinavio kaj la bordoj de la Arkta Maro, de meza Norvegujo ĝis la Blanka Maro, nombras entute ĉ. 25 000 homojn kaj loĝas en kvar regnoj: Norvegujo, Svedujo, Finnlando kaj Sovetunio. Pli frue ili vivtenis sin per fiŝkaptado, ĉasado kaj boacbredado kaj devis deiri norden pro la premo de la antaŭenirantaj terkulturistaj popoloj. Dum la lastaj jaroj la laponoj, same kiel aliaj pli frue subpremitaj malmultnombraj grupoj, ekpostulis siajn rajtojn mem decidi pri siaj aferoj, gardi sian ĉirkaŭaĵon, progresigi kaj mem profitigi sian ekonomion, kaj uzi kaj evoluigi sian propran lingvon.

Jen ni pritraktetas kelkajn aspektojn de la lingva situacio de la laponoj.

* * *

En la lapona lingvo nin interesas precipe tio, ke la Esperanta nomo de la norda cervo, "boaco", venas de la lapona. - La sorto de la propra lingvo estas la dua grava problemo de la nuntempaj laponoj. Domaĝe la laponaj dialektoj tiom diferencas inter si, ke komuna literatura lingvo ne estas ebla. Nordlapono komprenas nek la sudan laponon el meza Svedujo, nek la orientan el Sovetunio.

La unuaj lapone tradukitaj libroj, aboco kaj eta meslibro, aperis en Svedujo en 1619. En la sama sudlapona literatura lingvo aperis Nova Testamento en 1755 kaj la tuta Biblio en 1811. En la nordlapona lingvo aperis en Norvegujo Nova Testamento en 1840 kaj la tuta Biblio en 1898. Nuntempe la sudlapona lingvo preskaŭ estingiĝis, sed en la nordlapona ekzistas ioma literaturo.



Literatura Mondo kaj de la nica literatura revuo, li aperigis dum tri jaroj la neanstataŭigitan spritgazeton *La Pirato*, kiu "kaperis ĉiumonate".

La gaja spritulo kaj ĵonglisto de la lingvo estis ankaŭ severa kaj klera observanto de ĝiaj, eĉ implicaj, reguloj. Gramatikisto ne kabineta, li preferis elfosi la latentojn de Esperanto, kaj, kiam necese, eltiri el la verkoj de Zamenhof la abundajn ekzemplojn, kiuj pravigis lian *Ne kiel Meier* kaj lian kontribuon al la *Simpozio pri ata-ita*. Al li cetere la Akademio ŝuldas la instigon al studado kaj ĝustigo de tiu grava demando.

Ne estas troigo aserti, ke li stampis la Esperantan literaturon kaj parolvivecon per sia lingva genio. Kiu ĉeestis unu el la ĉiusemajnaj prezentoj ĉe *La Tri*

Koboldoj, povis konvinkiĝi pri la mirindaj eblecoj de la parolata Esperanto.

Sed ankoraŭ pli ol montri lian agadon, mi volas, intima amiko lia jam de kvardek jaroj, ĉefe diri, kia homo li estis: nutrita de antikva saĝo kaj profunde klera, sed neniam tion elmontranta, plena de fajna ĝentileco kaj delikateco al ĉiuj, eĉ al la plej malalt-rangaj, pacama, indiferenta al gloro, malŝatanta la vulgarecon, li vere estis homo homa, laŭ la konata formulo de Julio Baghy. Kaj mi ne povas sumi, kiom el mia esperantisteco mi persone ŝuldas al li . . . Verŝajne ankaŭ aliaj samon povus konfesi. Ankaŭ la Prezidanto de la Akademio, prof. G. Waringhien, tion mem rekonas.

Same kiel li ĝis la fino konservis la plej grandan intereson por tio, kion li servis dum pli ol sesdek jaroj, ni daŭrigu, ĉe lia ekzemplo, ĉiam plu labori por nia komuna celo.

Adiaŭ, Raymond Schwartz! Por mi kaj por kelkaj, nur: Ĝis!

Roger Bernard

KVAR REGNOJ

Eĉ en Finnlando estas tri diferencaj laponaj dialektoj aŭ pli ĝuste lingvoj: la nordlapona en Enontekiö, Utsjoki kaj Inari (ĉ. 2000 parolantoj), la inarilapona ĉirkaŭ la lago Inari (ĉ. 500) kaj la skoltlapona en Sevetijärvi (ankaŭ proksimume 500 parolantoj). La skoltlaponoj vivis origine en Petsamo (nuna Peĉenga en Sovetunio), sed post la lasta milito ili devis transloĝiĝi al Sevetijärvi.

Dum la lastaj jardekoj aperis en Finnlando presaĵoj nur nordlapone, escepte de kelkaj inarilaponaj artikoloj en la nordlapona gazeto Sabmelaš. En 1972 aperis stencilita skoltlapona abocolibro por la lernejo en Sevetijärvi kaj Nova Testamento estas tradukata skoltlaponen.

La nordlapona lingvo estas parolata ankaŭ en la nordaj partoj de Norvegujo kaj Svedujo kaj estas tial la ĉefa laponaj lingvo. Sed en Norvegujo kaj Svedujo oni uzas unu ortografion kaj en Finnlando alian. Nun estas starigita komitato, kies tasko estas interkonsenti pri unueca ortografio por la nordlapona lingvo.

Dum la lasta tempo la laponoj ekpostulis uzon kaj instruadon de gepatra lingvo en lernejoj. En Norvegujo tio jam estas komencita. Dum la unuaj du lernejoj jaroj la instruado okazas lapone kaj la norvega estas instruata kiel fremda lingvo. En la tria klaso la instruado eknorvegiĝas, kaj la laponaj iĝas elektebla fako por la restanta lerneja tempo. Simila sistemo estas komencota ankaŭ en Finnlando. Ĝis nun la tuta instruado okazis finne. Nur en tiaj maloftaj okazoj, ke la instruisto scipovis la laponan, li povis uzi ĝin kiel helplingvon kaj instrui ĝin al volontuloj.



En Sovetunio estis kreata literatura lingvo por la kolaj laponoj (de la Kola duoninsulo) en 1933. Aperis kelkaj libroj: interalie legolibro, aritmetika kaj kelkaj politikaj libretoj. Sed en 1937 la laponaj literatura lingvo estis retirita kaj ekde tio la rusa estas la lingvo de instruado kaj literaturo por la sovetaj laponoj.



OKAZE DE LA ORATORA KONKURSO POR LA JUNULARO EN BEOGRAD

Oratora talento havas altan valoron en ĉiu movado, kiu celas konvinki la publikon pri la praveco de siaj celoj. Same tiel en la Esperanto-movado. La Oratoraj Konkursoj — kies historion kaj celon priskribas en ĉi tiu artikolo profesoro Lapenna — helpas malkovri junajn talentojn, kiuj eble iam ludos gvidan rolon en la organizita movado aŭ en la prezentado de la Internacia Lingvo al la vasta publiko.

Sed por Esperanto mem, ĉe kies komenco ekzistis nur la skriba lingvo, la oratora arto ludis kaj ludas aparte gravan rolon, elformante novajn parolturnojn, fortikigante la internaciecon de la prononco, kuraĝigante novajn lernantojn al memfida parola uzo de la lingvo.

Unu el la programaj eroj de la nuntempaj universalaj kongresoj, kiu ĉiam altiras grandan atenton, estas la oratora konkurso por la junularo. La konkurso okazos ankaŭ dum la UK en Beograd. La kvar temoj estas allogaj por la konkursantoj kaj interesaj por la publiko: (1) Kion celas la hodiaŭa junularo?; (ii) Ĉu povas ekzisti internacia kulturo?; (iii) Lingvoj kiel portantoj de kulturaj valoroj; (iv) La studentaro kaj la ĝenerala publiko.

La tri plej bonaj oratoroj ricevos diplomojn kaj monpremiojn de 100 ĝis 40 guldenoj. Krome, la unua gajninto ricevos la transiran arĝentan pokalon "Ivo Lapenna". Por kuraĝigi kiel eble plej grandan

partoprenon en la ĉi-jara konkurso, la subskribinto donacis 5 binditajn ekzemplerojn de sia verko "Retoriko", tria eldono (1971), kiujn ricevos la tri gajnintoj aldone al la diplomoj kaj monpremioj, kaj du pliaj konkursantoj kiel rekonon pro la partopreno. En ligo kun tiu kongresa evento estas utile diri kelkajn vortojn pri la

Esperanta parolarto

Esperanto unue formiĝis kiel skriba lingvo. Nur poste, iom post iom, ĝi komencis esti uzata ankaŭ parole. Tial ne estas surprize, ke ankaŭ la arta kreado per la Internacia Lingvo sekvis la saman vojon: poe-

zio kaj literatura prozo, ĉu traduka ĉu originala, konsiderinde antaŭiris la parolarton.

La unuaj paroladoj en Esperanto estis eldiritaj de Zamenhof mem. Kvankam profundaj laŭ enhavo, ofte tre belaj laŭ strukturo kaj nepre gravegaj por la juna lingvo, tamen ili apenaŭ povas esti rigardataj kiel paroladoj en la kutima senco de la vorto. Liaj paroladoj estis fakte detale antaŭpreparitaj, komplete verkita skribe kaj poste legitaj publike. La vera Esperanta parolarto komenciĝas nur kun la apero de E. Privat sur la kongresaj podioj kaj aliloke. En simpla kaj bela lingvo, ofte uzante trafajn bildojn kaj direktante sin ĉefe al la sentoj, li sciis per kortuŝaj vortoj emocii kaj entuziasmigi la aŭskultantaron. Jam en tiu unua periodo de la Esperanta parolarto, dum la universalaj kongresoj kaj aliloke, ĉiam pli aŭdiĝis voĉoj ankaŭ de pluraj aliaj talentaj oratoroj aŭ prelegantoj. Okazis eĉ "oratoraj konkursoj", ekzemple dum la 13a UK en Krakovo (1931), kiam 8 kandidatoj partoprenis la konkurson.

Ankoraŭ tro malmultaj

Malgraŭ tiuj progresoj, la fakte grandaj esperantlingvaj oratoroj estis kaj restas nur kelkaj; ankaŭ la nombro de elstare bonaj, kompare kun la impona nombro da Esperantaj poetoj kaj prozistoj, estas ankoraŭ tro malalta. Ŝajnas, ke la Esperanta parolarto — kaj tre kredeble la parolarto en kiu ajn alia lingvo — estas la plej malfacila kaj postulema el ĉiuj artobranĉoj, kiuj uzas la lingvon kiel instrumenton de esprimiĝo.

Por plibonigi tiun staton la Estraro de UEA decidis en 1949 enkonduki oratorajn konkursojn dum la universalaj kongresoj. La unua provo estis farita en Bournemouth (1949). La relative kontentiga rezulto — neniu, laŭ la opinio de la juĝantaro, meritis la unuan premion — kaŭzis, ke la Komitato aprobis la ideon de regulaj oratoraj konkursoj kaj transdonis al la Estraro la taskon organizi ilin.

En 1950 estis ellaborita la Regularo pri la Oratora Konkurso por la Junularo, kiu estas plu valida kaj aperas en la broŝuro *Statuto kaj Regularoj de UEA*. Tuj post tio la Estraro decidis, ke la temo por la unua regula oratora konkurso, okazonta dum la UK en Parizo (1950), estu "Mondpaco kaj Esperanto". Estas vere emfazinde, ke la Estraro elektis ĝuste tiun temon, kiu spegulas la strebadojn de la Esperanto-Movado al internacia kompreniĝo, toleremo kaj monda paco.

Pozitivaj rezultoj

Efektive, la unua oratora konkurso laŭ la nova Regularo okazis en 1950 dum la 35a UK en Parizo. Ekde tiam la oratoraj konkursoj okazadis preskaŭ senescepte dum la universalaj kongresoj.

Ekde 1950 ĝis 1960 la Estraro de UEA ĉiam donis nur unu temon por la koncerna oratora konkurso. La temoj rilatis ĉefe al internacia kompreniĝo, monda paco, idea signifo de la Internacia Lingvo, k.s. Por ebligi pli vastan partoprenon, ekde 1960 la Estraro regule elektis plurajn temojn. Krome, oni decidis ligi la temojn ne nur al aktualaj demandoj

en la Esperanto-Movado, sed ankaŭ al pli vastaj problemoj kun internacia karaktero, kiuj interesas la nuntempan junularon. Plurfoje la temoj, aŭ almenaŭ unu el ili, rilatis al mondaj kampanjoj lanĉitaj de UN aŭ Unesko, en kiuj partoprenis UEA. Ekzemple, en la Jaro de Homaj Rajtoj (1968), dum la UK en Madrid, du temoj rekte rilatis al la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj.

La nombro de konkursantoj variis, sed bedaŭrinde ĝi neniam estis tre granda (maksimume 9). Male, la interesiĝo de la publiko ĉiam estis rimarkinda. Ne malofte ĉeestis 500-700 personoj. Ankaŭ okazis, ke eĉ tre grandaj salonegoj montriĝis tro malgrandaj, tiel ke multaj ne povis eniri.

La gajninto de la unua premio en la unua konkurso (1950) estis A. Albault (Francujo). En la dua konkurso (1951) N. Minnaja (Italujo) kaj A. Albault estis tiel bonaj, ke ili ambaŭ ricevis la unuan premion. Inter la gajnintoj de la unuaj premioj tri fojojn troviĝas la nomo de N. Minnaja kaj tri fojojn tiu de lia frato C. Minnaja. La aliaj gajnintoj de la unua premio estis H. Tonkin (Anglujo, nun Usono), J. Wells (Anglujo), S. Świstak (Pollando), Aŝvini-Kumar (Hindujo) du fojojn, K. Kordylewski (Pollando), F. Simonnet (Francujo), Svetomir Budimir (Jugoslavio), H.M. Maitzen (Aŭstrujo), H. Eichhorn (Germana DR), D. Charters (Anglujo, nun Usono), Iva Åberg (Svedujo). En Portland (1972) la unua premio ne estis aljuĝita, sed nur la dua, kiun gajnis C. Power (Usono).


La oratoraj konkursoj ebligis malkovri nombron da novaj elstaraj talentoj inter la junularo. Kiel oni vidas el la supra listo de la gajnintoj de unuaj premioj, la plimulto el ili ekokupis respondecajn funkciojn en la Esperanto-Movado. Ankaŭ aliaj konkursoj, eĉ tiuj, kiuj ne sukcesis gajni premiojn, per sia nura partopreno sendube kontribuis al la evoluigo de la Esperanta parolarto kaj tial ankaŭ al la Esperantlingva kulturo. Siavice, multaj el la ideoj esprimitaj dum la konkursoj helpis la prilumon de aktualaj problemoj ĉu en la nuntempa mondo ĝenerale, ĉu aparte, en la Esperanto-Movado. La oratoraj konkursoj estas taŭga forumo, en kiu gejunuloj de diversaj nacioj kaj alispecaj apartenoj povas libere esprimi siajn ideojn kaj interŝanĝi pensojn, kio certe progresigas internacian kompreniĝon.

Por pli granda partopreno

Espereble, la partopreno de gejunuloj en la oratora konkurso en Beograd estos pli granda ol en kelkaj el la lastaj kongresoj. Rajtas partopreni gejunuloj ĝis 28-jaraj. La partopreno en la konkurso estas senpaga, sed ĉiu kandidato devas sin skribe anonci al la LKK en Beograd aŭ al la prezidanto de la Komisiono por la oratora konkurso minimume unu tagon antaŭ la dato de la konkurso. Tamen, ju pli baldaŭ oni sin anoncas, des pli bone, ĉar tio faciligas pli efikan organizon.

En la nuntempa Esperanto-Movado niaj gejunuloj havas multajn eblecojn esprimi sin mem. La plej talentaj el ili aŭdigu sian voĉon pri aktualaj demandoj al vasta publiko dum la oratora konkurso en Beograd.

I. Lapenna



La pokalo Ivo Lapenna



REAPERIS VOJMONTRA VERKO

Recenzas Ulrich Lins (F.R. Germanujo):

Analiza historio de Esperanto-movado, de E. Drezen. Kioto: L'omnibuso, 1972 (represo de 1930). 95p. Ilus. 22cm.

Per tiu ĉi verko Drezen forlasis, eble kiel la unua, la tradicion de nuraj, ofte senkoloraj priskriboj de la historio de Esperanto haste verkitaj por aktualaj bezonoj de la propagando, klopodante analizi la estiĝon kaj evoluon de la movado antaŭ la fono de la sociaj kondiĉoj, en kiuj ĝi naskiĝis kaj venke sin levis el ĉiuj konkurantoj. Estas tre salutinde, ke fine aperis fotorepreso de tiu grava, vojmontra verko.

La aliro de la aŭtoro ebligas al ni pli bone kompreni la tiutempajn agantojn kiel infanojn de ilia epoko. Kvankam Drezen konstante emas vidi paralelojn inter la lukto en la burĝa Esperanto-movado kaj la kontraŭdiroj interne de la socialisma socio, volante pruvi ke ambaŭ iĝos viktimoj de neevitebla historia progreso, li plene agnoskas la valoron, kiun havis, por la vivo kaj enpenetro de la lingvo en la socion, la nebula "interna ideo" de la esperantistaj "amasoj" kaj la organiza talento de la francaj "oligarkoj".

Tamen, kelkfoje sin trudas la impresoj, ke Drezen ne entreprenis tian profundan studon de fontoj, kiu ne nur ne kontraŭdiras lian preferon al teoria analizo, sed devus esti ĝia bazo kaj konstanta akompanaĵo. Ke li grandparte dependis de sekundaraj verkoj de burĝaj aŭtoroj, sekve reflektiĝas en la tem-elekto de lia verko: ekzemple, en la eble iom eksterproportia spaco dediĉita al Hachette, Delegitaro, Ido ktp kaj en la relative ŝparema prezento de la movado ekster Parizo.

Drezen ŝajne ne sufiĉe konsideris aliajn faktorojn kaj evoluojn (ankaŭ ekstereŭropajn), al kiuj ŝuldiĝas la sukcesoj de Esperanto almenaŭ same kiel al la frukto-dona rivaleco de la parizaj gvidantoj aŭ al la kontraŭ-reforma kolektivismo de la "inerta amaso" de esperantistoj. Decis atendi ĝuste de Drezen pli detalan analizon de la rusaj idealistoj: Ĉu efektive ili nur "dorlotis" la lingvon, trovis en ĝi "certan ripozon" kaj praktikis socie negravan idealismon, dum la francoj manipulis la Majstro-kulturon kaj internan ideon por gardi sian monopolon kaj kontentigi sian "profit-avidon"? Tie ĉi Drezen inklinas konstrui troan kontraston inter la rusa kaj franca periodoj, evidente

por konformigi ĝin al sia determinisma rigardo de la historio:

Dum la tuta paso de la mondhistorio estis ĉiam nur du vojoj libere elektotaj – ĉu antaŭen, ĉu malantaŭen. Nek halton, nek flankiron la historio provas pravigi.

Kun tio akordigi la originon de la skismo en la laborista movado, prezentis al Drezen kelkan penon. Preter ĉiuj rezervoj kontraŭ la ideoj de Lanti necesas levi la demandon, kial SEU, la soveta unuiĝo, favoris supertendencan SAT kaj toleris sennaciismon en 1923 kaj ne plu en 1930/31. Tiurilate la aŭtoro ne restas fidela al sia promeso analizi tiujn ideojn kaj fortojn, kiuj "dum certaj periodoj regis kaj antaŭenpuŝis" la movadon.

Konklude, Drezen esprimis grandan fidon je la movado en Soveta Unio. Li estis konvinkita ke la estonta sukceso de Esperanto en monda skalo estas plej forte ligita kun la progresoj en Soveta Unio, ke de tie venos impulsoj por fari el la lingvo "apartenajn kulturan de ĉiuj modernaj akceloj kaj de vastaj homamasoj". Kiam ni relegas tiun optimisman profetaĵon kaj samtempe memoras la sorton de Drezen, nin preme okupas la penso pri unu granda tragedio.

Mendu ĉe UEA: 6,90 (por Nederlando 7,18) gld. plus sendokostoj 10%.

Komparo favoras la malnovan

Recenzas J.C. Wells (Londono):

Esperanto-lingva muzika leksikono, de Johano-Baptisto Briano. Milano: CEKIT de Itala Esperanto-Federacio, 1972. 95p. 21cm.

Novan terminaron oni komparas kun ekzistanta: en ĉi tiu kazo la komparo favoras la malnovan *Muzikan Terminaron* de Butler kaj Merrick (1944). Briano aranĝas la enhavon ne laŭ temo, sed en du alfabetaj listoj: la unua donas nudan italan tradukon de ĉiu Esperanta termino, kaj la dua ĝeneralan klarigon en Esperanto de la italaj terminoj. Por neitala uzanto, la leksikono estus pli utila, se la longa klarigo estus kroĉita al la Esperanta vorto kaj la simpla traduko al la itala termino: ĝenas en la nuna verko la ripeta neceso traduki en la italan por serĉi la sencon de Esperanta termino.

Enestas diversaj lingvaj kaj aliaj eraroj: ekzemple "doni al ili la ĝusto-tonon"; "la osciloj ne ŝanĝas laŭ vario de ilia amplitudo"; "Rhapsody en Blues". Kelkaj terminoj estas vere malbone elektitaj, ekzemple *plankanto* (speco de ĉanto, alie *plejnkanto*; senrilata al planoj!). Mi bonvenigas vastigon de *bando* por kovri ankaŭ la sencon "orkestreto"; sed kiel hodiaŭulo mi vane serĉis urĝe bezonatajn terminojn por aktuala popola muziko (*rock* ktp), kiel brito mi bedaŭras nemencion de nia folkloro muziko de riloj, ĝigoj, ktp, kaj kiel internaciisto mi sentis la mankon de mencio pri ekz-e ŝtalbandoj trinidadaj kaj sitaroj hindaj.

Mendu ĉe UEA: 7,68 (por Nederlando 7,99) gld. plus sendokostoj 10%.

Laikoj kaj studentoj bonvenigos...

Recenzas W.A. Verloren van Themaat (Amsterdam):

Enkonduko en la komputeran lingvistikon, de Heinz D. Maas. Liège (Belgujo): Someraj Universitataj Kursoj, 1972. 50p. 29cm.

Ĉi tiu libro baziĝas sur prelegoj faritaj dum Someraj Universitataj Kursoj en 1972 en Liège (Belgujo). Kiel jam la titolo supozigas, ĝi entenas ne multan originalan penslaboron, sed bone kaj skize prezentas la staton de la fako por laiko aŭ komencanta studento. Ĝi prezentas tiel la komputerteknikan flankon de la afero kiel la lingvistikan, la unuan relative koncize.

La komputera lingvistiko donis jam multajn praktike aplikeblajn rezultojn, ekz. aŭtomatan alfabetigon, aŭtomatan kompilon de oftectivortaroj, aŭtomatajn korektojn de presataj libroj, kiuj superfluigas presprovojn ĉe represo. La eksterulon interesas plej la aŭtomata tradukado. La plej malfacilaj problemoj en tio estas lingvistikaj, ne komputerteknikaj. Tre malfacila estas la malambiguigo. La kompetentuloj nun konsentas, ke perfekta aŭtomata tradukado restos revo, sed ke praktike la aŭtomata tradukado estos ebla kaj fruktodona. La aŭtoro pritraktas ankaŭ la diversajn metodojn de lingvistika analizo.

Mendu ĉe UEA: 15,— (por Nederlando 15,60) gld. plus sendokostoj 10%.

Recenzas Leszek Kordylewski (Pollando):

Bazaj nocioj de biologio, de C. Stép-Bowitz. Liège (Belgujo): Someraj Universitataj Kursoj, 1972. 115p. Ilus. 19cm.

La verko estas unu el la lernbroŝuroj enhavantaj la lekciojn de SUK-72. Ĝin nepre bezonos ne nur la estontaj SUK-studentoj. Ĝi valoros precipe por ĉiu interesiĝanto pri biologiaj problemoj; ankaŭ por medicinistoj por firmigi la natursciencan bazon de ilia scio.

La lingvaĵo estas simpla, kvankam ĝi priskribas nefacilajn problemojn; substrekinda estas la logika sinsekvo de la prezentado. Neniam aperas faka termino, antaŭ ol esti kontentige klarigita. Ĉiuj novaj terminoj estas substrekitaj, kio multe helpas ilin trovi. Mankas indekso kaj enhavlisto. Ankaŭ la sistemo de paĝnumerado ne estas sufiĉe klara. Avantaĝon prezentas, ke la historiaj rimarkoj estas limigitaj al necesa minimumo. La teksto formas klaran, universitatnivelan trarigardon de la nuntempa scio pri la pritraktataj kampoj de biologio. Post morfologia kaj bioĥemia priskribo de ĉelo la aŭtoro okupiĝas pri ĝia divido, sekve pri genetikaj kaj evoluismaj problemoj. La problemojn de Esperanta nomenklaturado i.a. tuŝas la ĉapitro pri sistematiko. Ĝi tamen favoras zoologion, dum botaniko estas same grava elemento de biologio.

Plue mankas konsekvenco pri la elekto de la temaro. Kelkaj branĉoj eĉ tro detale estas prezentitaj, dum aliaj malestas. La temelekton iel pravigas la celado al medicinistoj, sed por pli plena trarigardo de bazaj biologiaj kampoj mankas priskribo de la funkciado de la organismo kaj ĝia disvolviĝo.

Malgraŭ la etaj mankoj la tuta verko kiel valora informaro bone konfirmas la taŭgecon de la universitatnivela aplikado de Esperanto kiel instrulingvo de alia objekto.

Mendu ĉe UEA: 26,70 (por Nederlando 27,77) gld. plus sendokostoj 10%.

Melodioj,
kiuj
tuŝas
la koron



Recenzas Ramona van Dalsem (Hago):

Margaret Hill kantas britajn popol-kantojn. Falkirk (Skotlando): West Records, 1973. Serio "Krea Sono". 33rpm. Duflanka.

Jen nova disko, kiun certe ĉiu esperantisto kaj precipe popolkanto-amanto ŝatos havi en sia kolekto. Bedaŭrinde estas, ke oni ne plene povas ĝui la belecon de la tuto, ĉar ofte la vortoj tute ne estas kompreneblaj pro neklara prononco precipe en la rapidaj partoj. (En la rekantaĵo de la unua kanto, ekz-e, oni aŭdas "joviol' - egol' - brake ol - Mori" anstataŭ "jovial' - egal' - brake al - Mari".)

La alia kaŭzo de la ne bone aŭdeblaj tekstoj estas,

ke en la altskalaj partoj la klara sono de la voĉo iom perdiĝas, verŝajne ĉar la kantistino tro proksime kantis en la mikrofonon.

Estas konsilinde, ke oni havigu al si kune kun la disko ankaŭ la kantarono "Floroj sen kompar", ĉar tiam oni vere plene povas ĝui la belegan flekseblan voĉon de la kantistino, prezentanta la karakterizajn kantojn el la diversaj partoj de Britujo.

Mi estas certa, ke la ĉarmaj melodioj, bonege akompanitaj per gitaro kaj kantitaj de la belega voĉo de Margaret Hill, agrable tuŝos la korojn de multaj homoj.

Mendu ĉe UEA: 9,— (por Nederlando 10,44) gld. plus sendokostoj 10%.

Romantiko revenas



Recenzas Lajos Tárkony (Hungarujo):

Kun sopira koro, de Gustavo Adolfo Becquer. Tradukis Fernando de Diego. Zaragoza: Hispana Esperanto-Federacio, 1972: 93 p. 18 cm.

Jen komplete la tuta versvolumo "Rimas" de Becquer (1836-1870). La romantiko, nuntempe malŝatata, laŭ multaj signoj pli kaj pli enmodiĝas, do certe multaj ŝatos ĉi tiujn kantojn pri amo kaj morto. Ofte oni komparis la poezion de Becquer al tiu de Heine, kaj, fakte, ankaŭ Becquer kreskigas la amon en ian miton: li prikantas ĝin kaj la amatan per abundo da komparoj kaj metaforoj, kiuj efikas kun enlula aŭ kuntrena sugestieco. Plej animkaptaj estas liaj du larĝaj poemoj pri la morto: pri ties trista soleco (73) kaj milda paco (76).

Pri Heine memorigas ankaŭ la surprizaj turnoj versofine, tamen ne akre mokaj, sed pli mildaj: senreviĝaj, ironiaj, malesperiĝaj. Agrabla surprizo estas la traduko: Diego estas virtuoza de versoj; majstre li sciis konservi la fluan facilan simplecon kaj senperecon de la originalo. Notinde, ke tri pecojn (9, 16, 73) el "Rimas" tradukis Kalocsay por sia "Eterna Bukedo": komparo ne estas seninteresa. Pri la hispana asonanco necesus iom longa alineo, kiun mi ne disponas. Versamantojn multe plezurigos la libreto.

Mendu ĉe UEA: 6,— (por Nederlando 6,24) gld. plus sendokostoj 10%.

Predikoj kamuflitaj



Recenzas Rikardo Cash (Parizo):

Ne plu ludo... de N. Barthelmess. Parizo: SAT, 1973. 127p. 17cm.

Jen kvin noveletoj pri laboristaj infanoj, milito kaj sennaciismo, en Germanujo kaj Francujo, antaŭ, dum kaj tuj post la Dua Mondmilito.

Kio povus esti sufiĉe interesa legaĵo, bedaŭrinde peziĝas per plumpaj esprimoj, tordita sintakso kaj ĝenerale malfacila stilo. Kiam la aŭtoro provas elokventi, kiel plurfoje en naturpriskriboj, li sukcesas krei impreson nur de pezo kaj de maleleganto. La aŭtoro pretendas, ke ĉi tiuj noveletoj taŭgas precipe por la junularo; sed fakte la lingvaĵo ne estas modela. Troabundas superflujaj sufiksoj (la ecaj aĵoj adas al ni daŭre), same kunmetitaj aktivaj verboj (kial ni estu antaŭ kiam sufiĉas nur esti...?). Misuziĝas simplaj adverboj: *Ĉu vi ankoraŭ foriros* anstataŭ *Ĉu ankaŭ vi foriros*, kie ne temas pri nuanco. *Kiom ofte ajn* malglate tuŝas la okulojn kaj la orelojn.

Krom stile, ankaŭ teknike la noveletoj iom lamas. Nur du el ili povus nomiĝi vere noveletoj, kun disvolviĝo de intrigo. La ceteraj pli similas predikojn de la aŭtoro, maskitajn kiel meditado de la protagonisto. Sume: ĝi ne estas libro, pri kiu oni povus entuziasmiĝi.

Mendu ĉe UEA: 5,76 (por Nederlando 6,—) gld. plus sendokostoj 10%.

Necesis reviziigi

Recenzas Julius Balbin (Nov-Jorko):

El propra kaj fremda, de Hans Amund Rosbach. Kristiansund: Selano, 1971. 74p. Ilus. 22cm.

Estas nekredeble, ke la kompilinto-tradukinto de ĉi tiu antologieto de skandinaviaj poemoj kaj rakontoj kapablis mem fari tiom da eraroj gramatikaj, sintaksaj kaj eĉ ortografiaj. Povus ŝajni, ke li konfidis la transtajpon de sia verko al iu nekompetentulo, kies ambicio estis "plibonigi" ĝian lingvaĵon. Troviĝas ja en ĝi apenaŭ kelkaj paĝoj tute liberaj de iaj lingvaj misaĵoj.

Estas nepardoneble, ke la aŭtoro, kies nomo ne konfuzendas kun tiu de Johan Hammond Rosbach, konata norvega verkisto Esperanta, neglektis funde revizii — aŭ reviziigi — la tekston antaŭ ties finpresado.

Elstaraj nomoj de Ibsen, Lagerlöf kaj Björnson kaj aliaj donas al la libreto nemerititan prestiĝon. La kompilinto pliampleksigis ĝin per aldono de kelkaj originalaĵoj propraj kaj klopodis fari ĝin alloga per inkluzivo de grafikaj ilustraĵoj.

Mendu ĉe UEA: 6,30 (por Nederlando 6,55) gld. + sendokostoj 10%.

Laste aperis. . .

Analiza historio de Esperanto-movado (1931) E. Drezen (1892-1937?). 95p. 22cm. 6,90 gld. Grava, vojmontra teoria verko de la iama gvidanto de la soveta Esperanto-movado. Fotorepreso 1972.

El revuoj (1973) Kompilis Hukuta-Masao. 116p. Ilus. 22cm. 4,80 gld. Kolekto de interesaj artikoloj el diversaj Esperanto-revuoj, precipe japanaj. Malgranda parto estas japanlingva.

Enkonduko en la komputeran lingvistikon (1973) Heinz D. Maas. 50p. Diagramoj. 29cm. 15,— gld. (Someraj Universitataj Kursoj 1972). Tekniko — Manipulado de lingvaj datenoj — Kompilado de vortolistoj — Aŭtomata frazanalizo — Aŭtomata tradukado.

Esperanto and international language problems: A research bibliography 3a eld. 1972. Humphrey Tonkin. 23p. 22cm. 2,82 gld. Anglalingva gvidlibreto por seriozaj studentoj pri Esperanto kaj la lingva problemoj.

Jyväskylä, Finnlando (1973) Ilus. turisma prospekto kun mapo. Ricevebla de: Urba Turistoficejo, Vapaudenkatu 38, Jyväskylä.

Pedagogia-didaktika eksperimento: Baza dokumentaro I. Szerdahelyi. Kvar volumoj: 29, 34, 27 kaj 43p. Mimeo. 29cm. Unu kompleto kostas 6,84 gld. Enkonduko en instrumentodon -- Didaktika morfemaro -- Instruplano kaj instrumaterialo -- Didaktikaj kaj instrumentodaj konsiloj. Preparitaj por la 5-landa eksperimento komencita en 1971 en sudorienta Eŭropo.

Septembra ribelo, poemaro (1973) Bulgaro Nekonata. Red. Canko Murgin. 19p. Ksero. 19cm. 2,82 gld. Originala poemareto pri la kontraŭfaŝisma ribelo en 1923. Aldonitaj estas kelkaj originaloj de C. Murgin kaj tradukoj el aliaj bulgaraj poetoj.

Skizoj pri la usona novkoloniismo (1972) 1a parto: *Novkoloniismo kaj monda strategio*. 188p. 19cm. 1,74 gld. 2a parto: *La usona novkoloniismo en Sud-Vjetnamio*. 236p. 19cm. 1,74 gld. Eld. de Fremdlingva Eldonejo, Hanojo.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.



Kion vere signifas

"Bjalistoko" ?

Skribas Józef Uzdziło (Pollando):

Ĉu ĝuste estas (en la artikolo "Bjalistoko" en la decembra *Esperanto*), la etimologion de la urbonomo serĉi en la kunmeto de du polaj vortoj: "Biały" (blanka) kaj "stok" (deklivo)? Mi demandis pri tio mian fraton - diplomiton pri litova filologio de Vilnius-Universitato, nun loĝantan en Bialistoka vojevodio. Asertas li, ke elkonduki la etimologion de "Białystok" el *Biały* + *stok* estas pli ol neserioze almenaŭ pro jenaj kialoj. Unue: kial la rivereto nomiĝu "Biała" (ankaŭ blanka, sed viringenre), ja ĝi havas nenion komunan kun blankeco; ĝia fundo estas torfa kaj la koloro bruna. Due: en la tuta Bialistoko, kiom ajn ĝi estas longa kaj larĝa, neniuj povas montri monteton kun almenaŭ iomete kruta deklivo, kiun oni povus nomi "stok". Des malpli ekzistas simila deklivo en la riveretproksimeco, kaj nur tia povus havi influon por kreiĝo de simila vortkunmeto. Trie, la komponaĵo de la vorto mem: "biały" kaj "stok" estas vortoj virgenraj, kaj la nomo de la rivereto "Biała" estas viringenra. Lingve do la vortkunmeto Białystok estas nelogika. Ĝi devus signifi blankan deklivon, kaj deklivo, eĉ se ĝi ekzistus, povas esti blanka nur vintre.

Se la unua historia periodo de Bialistoko estas litova, do ĉu ne estus ĝuste ankaŭ ĝian etimologion serĉi en la lingvo litova? Pollandaj litovoj Bialistokon en sia lingvo nomas - "Balstoge" (marĉtegmento), kaj ni analizu ĉi tiun komponaĵon. La tereno de Bialistoko kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas marĉo-marĉoj (litove - bala, balos). Ankaŭ la rivereto povis nomiĝi "Bala", kaj certe ĝi havis alian nomon ol "Biała". Kiam ĉe la rivereto ekestis vilaĝeto, la tegmentojn, elstarantajn de marĉoj, homoj povis nomi simple "Balos stogaj" (marĉaj-enmarĉaj tegmentoj), kaj se dum iu periodo estis tie nur unu kabano, ĝi povis esti nomata - "Balstoge" (marĉtegmento). Poste venintaj alinaciaĵoj la terminon "bala", nekompreneble ĝin, povis identigi ne kun la grundo sed kun la rivereto, de kie povis veni la riveretnomo "Biała". Kaj la lokonomo mem de "Balstoge" (aŭ eble ĝi havis iam iom alian formon), irante tra alinaciaĵoj buŝoj, povis formiĝi je "Białystok".

Strange, ke neniuj donas pruvon...

Skribas M.E. Falla (Britujo):

La ĉefartikolo de d-ro Corsetti ("*Esperanto*", 1973, aprilo) pensigas, ĉu esperantistoj vere kredas, ke Esperanto estas valoraĵo.

En komerco, kiam oni kredas, ke oni posedas valoran rimedon (novan procezon, ilon aŭ ion ajn), oni tuj aplikas ĝin kaj tiel profitas. Tio rezultigas, ke la konkurencantaro devas aŭ mem adopti la rimedon aŭ trovi pli bonan aŭ ekŝiĝi el la komerco.

Ni asertas, ke Esperanto estas valora ankaŭ en komerco. Se tio estas vera, kaj se ni tion vere kredas, estas strange, ke ĉiu esperantisto estas tiel sindona, ke neniuj ekspluatas ĉi tiun valoraĵon por krei sukcesan komercan organizaĵon!

Laŭ la teorio, Esperanto donus avantaĝon al internacia entrepreno, kiel ajn malgranda, kontraŭ la konkurencantoj. Ĉu ne jam estas tempo por pruvi tion?

Ni nomu korekte la amerikojn !

Skribas Bernard Golden (Hungarujo):

Traleĝinte la artikolon de prof. Neergaard en la aprila numero de *Esperanto*, mi trovis la piednotan klarigon pri *Latinameriko* ne taŭga. *Latinameriko* estas kultura nocio, do ĝi ne estas difinebla per geografiaj terminoj kiel *Sudameriko* kaj *Centrameriko*. Laŭ mi la ĝusta signifo estas la jena:

LATINAMERIKO: la tuto de la amerikaj landoj, kies loĝantoj parolas latinidajn lingvojn, t.e. la hispanan, portugalan kaj francan. Sekve, Latinameriko ne inkludas, ekzemple, la anglalingvajn landojn de Antiloj, nek Britan Hondurason en Meza-ameriko nek Surinamon, Gvajanon kaj Falklandojn en Sudameriko.

Ekzistas analogie ceteraj terminoj por precizigi aliajn kultur-regionojn en Ameriko kiel la sekvaj:

HISPANAMERIKO: la hispanparolantaj landoj de Meza-ameriko kaj Sudameriko kaj larĝsence ankaŭ la regionoj de hispana lingvo kaj kulturo de la sudo-okcidento de Usono.

IBERAMERIKO: la hispanparolantaj landoj kune kun la portugallingva Brazilo, t.e. tiuj landoj, kies lingvoj kaj kulturoj venas de la Ibera duoninsulo.

Laŭ la listigo de la landoj vizititaj de prof. Neergaard la ĝusta titolo de lia artikolo devus esti "Impresoj pri Iberameriko".

LOKE

Britujo

- Dua kunveno de la Poresperanta Grupo de Parlamentanoj okazis la 11an de junio. Ĝia ĉefa diskuttemo estis: kiamaniere la parlamentanoj povas influi la oficialajn instancojn rilate al la instruado de Esperanto en lernejoj.

Danlando

- La ministerio de komerco ĵus eldonis 23-lingvan faldfolion pri ŝanĝo en la dana monera sistemo. La tradukoj el la dana originalo en la 22 aliajn lingvojn estis faritaj ekskluzive per helpo de Esperanto, je tre malalta kosto. Rezulte, la direktoro kaj redaktoro de la koncerna departemento ekdeziris lerni Esperanton kaj multaj aliaj interesiĝis. Kompreneble, inter la 23 lingvoj aperas ankaŭ la Internacia.

Hispanujo

- En Calella (provinco Barcelona) du novaj vendejoj por turistoj havas la nomojn "Bazaro Esperanto" (strato Jubara 98) kaj "Verda Stelo" (n-ro 71 en la sama strato).

Israelo

- En aprilo okazis en Petaĥ Tikva landa konferenco de Esperanto-Ligo en Israelo, kun 100 ĉeestantoj, el kiuj 10 eksterlandaj gastoj. Informis pri la konferenco la tuta israela gazetaro, kaj aperis 5-minuta radio-intervjuo kun la eksterlandanoj. Antaŭ la konferenco komenciĝis la unua israela koresponda kurso de Esperanto.

Kanado

- En la nacia televida programo *Viewpoint* (vidpunkto) la 16an de majo, s-ro Kirk Crockett (FD de UEA en Victoria) parolis dum kvin minutoj por prezenti la proponon, ke la kanada registaro rekomendu Esperanton, precipe kiel komunan lingvon por la kvar pacgardistaj kontingentoj en Vjetnamujo, t.e. la hungara, indonezia, kanada kaj pola.

Kolombio

- Laŭ instigo de la estraro de la universitato Universidad Pontificia Bolivariana en la urbo Medellín, okazos en julio intensa Esperanto-kurso por la personaro de la universitato. La universitato subtenas la kurson finance. Instruas la loka aktivulo s-ro Manuel Angel M.

Koreujo

- Pli ol 13 000 personoj vizitis ekspozicion de Korea Esperanto-Societo kaj Korea Esperanto-Junularo en la koro de la ĉefurbo Seulo dum 6 tagoj en aprilo. Raportis ĵurnaloj, radio kaj televido, kaj pli ol 600 personoj enskribiĝis kiel "amikoj de Esperanto" aŭ kiel kursanoj. Fine de aprilo kaj komence de majo la TV-stacio MBC-TV elsendis trifoje 50-minutan

prelegon pri Esperanto de Gim Taekeng, gvidprofesoro de Esperanto en la universitato Seoul Meong-Ji kaj delegito de UEA. Rezultis svarmo da alskriboj, kaj KES kaj KEJ konsideras starigon de koresponda kurso.

Soveta Unio

- En Ufa (Baŝkirujo) okazis la 7a renkontiĝo de esperantistoj de Volgo-Uralo kun 150 partoprenantoj. En la programo: seminario de aktivuloj, koncerto, lingvaj konsultoj, distraĵoj. La Esperanto-movado rapide vastiĝas en Uralo, precipe en Baŝkirujo, kaj la ĉefaj gazetoj regule publikigas artikolojn.
- Rezulte de Esperanto-leciono en nove inaŭgurita universitato en Syktyvkar (Komia Aŭtonoma Respubliko), ĝia estraro decidis organizi fakultativan studon de Esperanto por la studentoj ekde la nova studjaro kaj ankaŭ kursojn por la universitataj instruistoj.

FAKE

Literaturo

- La verko originale Esperanta de s-ro Victor Lebrun kun rememoroj pri Leo Tolstoj, kies parto estis foje prezentita en *Esperanto* (n-ro 799/800, p. 128/130), ekaperadis en pola semajna revuo ("Wiadomości", eldonkvanto 60 000 ekzempleroj) kiel seria artikolo. Ĉiu serio enhavas mencion pri la elesperantigo fare de Tyburcjusz Tyblewski.

Aspekto de
"La neĝa
reĝino" de
H.C. Andersen
en la prezento
de la Pupp-
teatro de Ruse
(vidu sub
"Pup-teatro")



PERSONE

Pedagogio


- Sub la aŭspicio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj la instruista sekcio kaj Sofia distrikta komitato de Bulgara Esperantista Asocio organizas en aŭgusto Internaciajn Esperanto-Kursojn por Instruistoj (6-25) kaj Internacian Pedagogian Esperanto-Seminarion (12-25). Interesiĝantoj skribu al: Okrâĵen Esperantski Komitet, bul. Ĥristo Botev 97, Sofio-3, Bulgarujo.

Politiko

- Kiel n-ro 37 de la bulteno *Informilo* de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (Hanojo) aperis la kompleta teksto en Esperanta traduko de la "Akto de la Internacia Konferenco pri Vjetnamujo", subskribita la 2an de marto 1973 en Parizo. La originala teksto de la Akto estis redaktita en la lingvoj angla, ĉina, franca, rusa kaj vjetnama, kaj ĉiuj kvin naci-lingvaj tekstoj estas agnoskitaj kiel egale aŭtentikaj.

Pupteatro

- En Danlando la bulgara pupteatra grupo de 19 personoj, "La Pupteatro de Ruse", faris longan profesion vojaĝon kaj prezentis Esperante entute 16-foje la teatraĵon "La Neĝa Reĝino" de la tutmonde konata H.C. Andersen (dano), en lernejoj kaj infanbibliotekoj. Ĝia alta profesia nivelo tre bone impresis la spektantojn. Pro sia bona sperto de kultura ambasadorado, la grupo nun preparas alian teatraĵon esperantigi. Por tiuj infanoj, kiuj en la lernejo lernas Esperanton, prezentado tia estas tre valora kaj inspira, ankaŭ el lingva vidpunkto.



La polaj geaktoroj Kalina Pieńkiewicz (maldekstre) kaj Zbigniew Dobrzyński prezentis la teatraĵon "Proksima nekonato" de Aleksander Ścibor-Rylski al Esperanta publiko en pluraj usonaj urboj dum turneo aranĝita sub la nomo de Pola Esperanto-Teatro. Jen sceno el la prezento en Los Angeles, la 26an de majo 1973.

Teatro

- La originale esperantlingva teatraĵo *La reto* de franca aŭtoro Bukar aperis denove sur scenejo en Francujo okaze de la 12a Paska Kultura Semajno, organizita de la franca sekcio de TEJO, en aprilo. *La reto* estis prezentita en 1972 dum tri semajnoj en pariza kafejo-teatro.

PERSONE

De Smedt

- Okaze de la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Luksemburgo (junio 1973) geedziĝis s-ro Petro De Smedt el Belgujo (aŭtoro de la Nederlanda Bibliografio de Esperanto) kun Kjoko Hata el Japanujo. Kiel atestantoj de la geedziĝo oficis ambasadoro Ralph Harry el Aŭstralio kaj s-ro Wague Moussa el Senegalio.

Hoekstra

- S-ro Oene Hoekstra, delegito de UEA en Schoorl, Nederlando, kaj ŝarĝito pri la Informa Fakto de la Nederlanda Esperanto-Asocio L.E.E.N., vizitas en julio Kolombion, kie en la lasta tempo ekfloris tre vigla movado kun bonaj rilatoj kun la nacia gazetaro. Li kaptas la okazon por preparoli la problemojn de la landa movado, viziti universitatojn, kie Esperanto estas instruata, kaj kontakti kun ĵurnalistoj kaj radio-raportistoj.

Tyblewski

- La ŝtata pola organizaĵo de diversbranĉaj verkistoj, Societo de Aŭtoroj "Zaiks", per decido de la 11a de majo akceptis kiel membron la delegiton de UEA por Jelenia Góra, s-ron Tyburcjusz Tyblewski. La decidon influis ankaŭ liaj atingoj en la Esperanta literaturo traduka kaj originala.

NEKROLOGOJ

MAURICE FRECHET (1881-1973)

Forpasis prof. Maurice Fréchet, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA de post 1958. Li estis mondfama matematikisto, membro de pluraj akademioj de sciencoj, interalie tiuj de Francujo, Polujo kaj Nederlando, kaj emerita profesoro de matematiko en la Scienca Fakultato de la Universitato de Parizo. Prezidanto de ISAE de 1950 ĝis 1953 kaj aktiva pledanto por Esperanto en sia fako, li aperigis plurajn matematikajn studojn originale verkitaĵojn en Esperanto kaj kunlaboris en *Sciencaj studoj*. Nelaste, li estis honora membro de Internacia Instituto de Statistiko, honora prezidanto de Federacio de Francaj Sciencaj Societoj kaj antaŭa prezidanto de Matematika Societo de Francujo. La franca ŝtato honorigis lin per la ordeno de la Honora Legio.



Arthur Brooks Baker

ARTHUR BROOKS BAKER (1877-1973)

La 22an de majo mortis s-ro Arthur Brooks Baker, 96-jara, verŝajne la plej aĝa esperantisto en Usono. Li lernis Esperanton en 1906, verkis du lernolibrojn kaj eldonis la gazeton *Amerika Esperantisto* de 1906 ĝis 1910. En 1909 li vojaĝis al Barcelono por inviti la sesan Universalan Kongreson al Usono, kaj dum tiu Kongreso (en Vaŝingtono en 1910) li konatiĝis kun Zamenhof.

JAROSLAVA MÍČOVÁ

La 27an de aprilo en la aĝo de 52 jaroj mortis en Praha post tre longa malsano Jaroslava Míčová. Dumviva membro kaj fakdelegito de UEA, ŝi grave helpis la kandidatigon de UEA por la pacpremio Nobel kaj estis unu el la monde plej aktivaj kolektantoj de subskriboj por la Propono al UN en 1965-66.

INFORMEJO

Vi demandas — ni respondas

ĈU ekzistas ia ajn libro, kiu pritraktas la temon: ĉiutage uzataj kaj praktikaj kunmetitaj vortoj en Esperanto, kiel ekz-e gladotabulo kaj vestarko? Kiel nomi haŭtŝiraĵon apud ungo? Ungopendaĵo? Kaj ĉu la neceseja aparato mem povus esti "necesatoro"?

Respondo: La plej praktika speco de vortaro el tiu vidpunkto estas la bildvortaro aranĝita laŭteme. Tia, ekzemple, estos la Esperanta bildvortaro en la serio de Duden, kiu estas preparata de Esperanto-Press en Kanado. Ligita kun tiu eldonprojekto estas ankaŭ Slipara Vortaro, mendebla ĉe la Libroservo de UEA. Ankaŭ ĝi enhavas ilustraĵojn kaj kolektas unuavice teknikajn terminojn.

LEON COURTINAT

Mortis la 29an de majo, 79-jara, Léon Courtinat, delegito de UEA, emerita direktoro de la franca poŝto kaj ĉefe konata kiel aŭtoro de la trivoluma *Historio de Esperanto*, kiu, malgraŭ neperfektaĵoj, kunigis multajn valorajn dokumentojn.

Ĝenerala sciigo

Forpasis 59-jara je 14.5.73

WIJPKJE STEFFERING

Leeuwarden, Molenpad 28, Nederlando

H.J. WIERDA, notario
(testamenta plenumanto)

La kremacio okazis en Groningen.

WIJPKJE STEFFERING

Wijpkje (Wies) Steffering, kiu forpasis la 14an de majo, estis la prezidantino de Frisa Esperantista Rondo en Leeuwarden, Nederlando. Ŝi estis senĉese aktiva en la loka movado kaj en la lastaj jaroj kun entuziasmo iniciatis kelkajn tre sukcesajn aranĝojn okaze de la Semajno de Internacia Amikeco.

ELISABETH LINNUSE (1896-1973)

La 13an de majo forpasis en Tallinn, Estonio, Soveta Unio Elisabeth Linnuse, malnova aktivulino de la estona Esperanto-movado. Jam en 1922 ŝi instruis la lingvon en lernejoj kun ministeria permeso, kaj en 1956, kiam ŝi helpis restarigi la movadon, ŝia kurso estis la unua de post la mondmilito. Ŝi kunlaboris en *Norda Prismo*, uzante la pseŭdonomon Ille Selin.

KURIOZE

Trafa, facile prononcebla kaj memorebla nomo de iu firmo aŭ varo ofte montriĝas efika propagandilo. Esperanto pro sia belsoneco ne estas malofte renkontebla en tiu nomaro de aferoj kaj aĵoj, kiuj havas nenian ligon kun nia movado. Al la japanaj magnetofonoj "Belsona", nutraĵ-vendejoj "Vivo", teleroj "Preta", horloĝoj "Eterna" kaj "Movado", antaŭ nelonge aldoniĝis - jes, belsona, sed tute mistrafa nomo, per kiu oni baptis novan nederlandan bankon, estiĝintan el kunfandiĝo de *Raiffeisenbank* kaj *Boerenleenbank*, kiuj per tiu kunfandiĝo kronis sian 75-jaran ekziston. La nova nomo de la banko estas RABO-Bank. Ŝajnas evidente, ke oni ne konsultis Esperanto-vortararon antaŭ ol elekti la nomon!



Parolante ĉe la inaŭguro de la konferenco de *Alliance Française* en Nice (Francujo), la nova franca ministro pri kulturaj aferoj, s-ro Maurice Druon, interalie diris, ke la franca lingvo devus denove ĉefroli en la diplomatio, "ĉar kiam ĝi estas bone parolata, la franca ne permesas al la homoj mensogi". Tiu aserto ŝajnas des pli stranga, se oni konsideras, ke por sukcesa mensogo necesas nepre majstri la lingvon, en kiu oni praktikas tiun "arton".

ĈU U.E.A. — KAJ CETERE LA TUTA ESPERANTO-MOVADO — ESTAS TRO SERIOZAJ ?

Kelkfoje oni riproĉas al U.E.A. kaj al nia movado, ke ili estas tro seriozaj, teda organizaĵo kaj malridemaj, seriozaj homoj, kiuj senĉese parolas pri lingvaj demandoj, gramatikaj, interpopola paco kaj kulturaj valoroj. Petolemulo aŭ eble -ino, iam inventis la vortludon "Esperanto — Edz-peranto", sed ne ĉiuj aprezis ĝin. Estas vere, ke laŭ ekstera ŝajno nia movado aspektas ofte iom rigora kaj rigida, sed nenio estas malpli vera. De la plej fruaj tempoj en nia historio ekzistis

ESPERANTA ĜEEDZIĜO

Aperis pri-edziĝa peto
De junulo, en gazeto, —
Responde skribis junulino
Pri samtema korinklino, —
Kaj baldaŭ ili, laŭ promeso,
Renkontiĝis ĉe l'kongreso, —
Ĉar ili plaĉis reciproke,
Geedziĝis tuj, samloke, —
Ĝi estis grandioza festo
Pro multnombra homĉeesto
Ne multaj ĉe la pastra beno,
Sed — multegaj ĉe l'festeno!
Kaj la kongres-sekretario
Zorgis pri l'ceremonio: —

Soifa Lingv'-Komitatano
Trinkis je l'geedza sano; —

Kasisto perdis sian kason
Dum li malplenigis glason; —
Kaj oni aŭdis Prezidanton
Kanti tre petolan kanton; —

Mallerta Akademiano
Rompis glason de ĉampano:

Vegetarano pro sufoko
Glutis oston de la koko; —

Kaj ĉastemulo kun plezuro
Pinĉis en virina kruro; —

Abstinenculo, ve, sen danko,
multe vomis sur la planko; —

Entute ĉiuj festarangon
Longe laŭdis kaj la manĝon ...

La nova paro ĝojpetola
Tre deziris ... esti sola, —

Al ĉiuj do adiaŭdiris,
Kaj diskrete ili iris, —

De U.E.A. la delegito
Gvidis ilin ĝis la lito, —

Kaj tiam li, pro bona ordo,
Gardostaris ĉe la pordo; —

Klarigaj notoj

peto pri edziĝo

temas, evidente, pri Universala Esperanto-Kongreso ĉar ili plaĉis unu al la alia, ili tuj geedziĝis, an la sama loko (la Kongresa urbo) la homoj, kiuj ĉeestis, estis multaj (en nombro)

la "Lingva Komitato" ekzistis ĝis 1948 kaj estis, kun sia supera organo "la Akademio", kreita por gardi la unuecon de la lingvo. Ekde 1948 funkcias tiucele nur la "Akademio de Esperanto"

Noto: ĉiu U.K. havas kongres-kasiston

ĉar ni ne scias pri kiu kongresjaro temas, ni sekve ne povas eltrovi pri kiu prezidanto temas

la kompatinda vegetarano sufokiĝis ĉu pro varmo, ĉu pro rido, ĉu pro manĝemo

abstinenculo = homo, kiu rifuzas trinki alkoholaĵojn

ĉiuj longe laŭdis kaj la arangon de la festo kaj la manĝon

ĝojpetola = kunmeto de 'ĝoja' kaj 'petola'. La nova paro ĝojis kaj deziris petoli (karesi unu la alian)

la aŭtoro ne malkaŝas ĉu temas pri normala aŭ faka delegito

gardostari = stari soldatece por gardi ion (iun). Milita gardostaranto

gajemuloj, spritaj spiritoj, kiuj kuraĝis foje ridindigi sin mem kaj la aferojn, por kiuj ili batalis. Unu el niaj plej eminentaj satiristoj estis Raymond Schwartz, pro kiu ni ĉiuj nun funebras kaj kiu, antaŭ pli ol 40 jaroj, jam komike *pririmis* la geedziĝojn en Esperantujo kaj la rolojn kaj funkciojn de niaj diversaj instancoj je tiaj okazaĵoj. Jen sekvas unu el liaj versaĵoj, titolita:

Rigardis li, pro malenuo,
Iom tra l'serura truo, —

Kaj poste sendis li, laŭ devo,
La raporton al Ĝenevo, —

Ni legos eble pri detaloj
En Jarlibro aŭ ĵurnaloj

Klarigoj:

pri-rim-i: en rimaj versoj komenti pri io/iu.

pro malenuo = por sin distri

la unua oficejo de U.E.A. estis en Svislando (Ĝenevo)

la aŭtoro evidente aludas la Jarlibron de UEA, kiu ja donas ĉiajn detalojn pri ĉio en nia Movado

EL NIA ANEKDOTARO

Ĵus dungita juna ŝtat-oficisto malkovras en la *subtegmentejo* de la Ministerio plurajn kestojn plenajn je aktoj kaj dokumentoj el la jaro 1920.

"Vi certe konsentas, ke mi *neniigu* tiujn antikvaĵojn" —li demandis al sia superulo.

"Kompreneble, sed pro sekureco unue *foto-kopiigu* ilin!"

sub-tegment-ej-o: ejo (loko, ĉambro), kiu troviĝas sub la tegmento; mansardo.

neni-ig-i: agi tiel, ke io aŭ iu ne plu ekzistas; detru.

foto-kopi-ig-i: igi iun fari fotitan kopion de io.



Se mi estus sciinta, ke vi timas formikojn, vespojn, raŭpojn, araneojn, bovojn, ŝafojn, urtikojn kaj sunfrapojn, mi estus kondukinta vin al muzeo!

Decidu ankoraŭ por Beograd !

ALIĜOJ ESTOS AKCEPTATAJ ĜIS EN LA KONGRESO MEM!



58-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Beograd, 1973 07 28 – 08 04.

Alta Protektanto: Prezidanto de Jugoslavio, Josip Broz Tito


Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando

OFICIALA KOMUNIKO

Du gravaj akceptoj

Reprezentantojn de la LKK kaj de Jugoslavia Esperanto-Ligo akceptis en marto 1973 la prezidanto de Socialista Unuiĝo de Jugoslavio kaj membro de la Honora Kongresa Komitato s-ro Veljko Milatović, kiu promesis konkretan helpon al aktivado por Esperanto. La delegacion de la LKK akceptis ankaŭ la vicurbestro de Beograd s-ro Živko Kovačević por priparoli la kunlaboron rilate al la UK.

La (klimatizita) kongresejo Domo Sindikata, sur la placo de Marx kaj Engels en Beograd.



Programo de ISU fiksita

La Estraro de UEA akceptis 10 proponojn por la 26a sesio de Internacia Somera Universitato. Parenteze aperas la koncernaj temoj. D-ro W. Bormann, F.R. Germanujo (Internacia komerco kaj valutoj); R. Harry, Aŭstralio (Evoluo de la internacia juro pri la maro); d-ro O. Haszpra, Hungarujo (Modeleksperimentoj kiel modernaj helpiloj de la hidroteknika planado); prof. I. Lapenna, Britujo (Bazaj juraj principoj de la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo); prof. R.A. Lewin, Usono (Glitivaj mikroboj); d-ro H.M. Maitzen, F.R. Germanujo (Oro kaj alkoholo en la kosmo); prof. V. Peevski, Bulgarujo (La fotogrametrio kaj ĝia aplikado); G. Sredić, Jugoslavio (Ekonomieco de transportado de varoj en konteneroj); d-ro M.V. Stojanović, Jugoslavio (La mezepoka serba eposa heroo Marko Kraljević en balkanlanda folkloro); prof. A.P. Thewrewk, Hungarujo (Biblio kaj astronomio). La Rektoro estos profesoro B. Popović, Jugoslavio.

Aperis la oficiala bulteno de la 29a IJK

La organiza komitato de la junulara kongreso en Sarajevo aperigis utilan informilon, i.a. kun enkonduka artikolo pri la kongresa ĉeftemo "Junularo kaj la Hom-medio". La bulteno ankaŭ mencias kondiĉojn de la foto-konkurso kun la temo: "Jen, ĝi estas la hom-medio".

Komedio de Nušić en Esperanto


La Teatra Vespero de la Kongreso konsistos el la komedio "Aŭtobiografio" de la plej konata serba komediverkisto Branislav Nušić (kies komedioj "Analfabeto" kaj "Butono" estas jam haveblaj libroforme en la Internacia Lingvo). Prezentos ĝin trupo el Zagreb sub gvido de la aktoro Mladen Šerment, multjare konata al spektantoj en la Universalaj Kongresoj pro pluraj elstaraj roloj en la iama Internacia Arta Teatro.

Kongresa afiŝo havebla

La Turisma Oficejo de Beograd disponigis al la LKK 200 kolorajn bildafiŝojn, al kiuj la LKK surprisigis esperantlingvan tekston. Interesitoj povas peti ekzempleron ĉe la adreso de LKK (Terazije 42, YU-11000 Beograd), sendante 2 internaciajn respondkuponojn por la poŝtendo.

Nombro de aliĝintoj (statistiko je 1973 06 10)

Arg. 1, Aŭstral. 12, Aŭstrujo 22; Belg. 38, Braz. 3, Brit. 96, Bulg. 47, Ĉeĥ. 7, Dan. 19, Egipt. 2, Finn. 51, Franc. 176, FRG 85, Grek. 4, Hind. 1, Hisp. 50, Hung. 32, Isl. 3, Isr. 5, Ital. 95, Jap. 62, Jug. 130, Kan. 22, Kore. 5, Libano 1, Meks. 3, Ned. 81, Norv. 16, NZ 5, Pol. 23, Portug. 7, Rum. 2, Sov. 11, Sved. 72, Svis. 15, Turk. 1, Usono 115, Venez. 1. Entute: 1321 aliĝintoj el 38 landoj.



I.J.K.

JUNULARO KAJ HOM-MEDIO KROMAJ FAKTOJ PRI IJK 73

Kiel vi certe ĉiuj memoras, la temo de la ĉi-jara IJK, kiu okazos sekvontmonate en Sarajevo (Jugoslavio), estos: "Junularo kaj la hom-medio". Hodiaŭ ni volas prezenti al vi pli detalan subtemaron, por ke vi sciu, pri kio precize temas:

Aero-malpurigo.

Malpurigo de akvoj.

Analfabeteco kaj klerigado.

Malsato kaj manko de nutraĵoj.

Fizika detruado de la homa ĉirkaŭaĵo.

Ekspluatado de la naturaj riĉaĵoj — ĝis kiuj limoj?

Ĉu militoj kaj armado servas al la estontaj generacioj?

Demografia eksplodo — ĝis kiuj limoj?

Ĉu la nuntempa urboplanado adekvatas?

Teknologio en agreso kontraŭ la naturo.

Fremdiĝo de la juna homo en moderna urba medio.

Problemoj de etnaj minoritatoj en la junulara medio.

La pozicio de la juna homo en la moderna produkto-procezo en la konkreta ekzemplo de jugoslavia memmastruma socialismo.

Memmastrumado kaj la homa fremdiĝo.

Lingvo kaj la hom-medio.

La rolo de la Internacia Lingvo en la movado por la hom-medio kaj ĝenerale en la moderna internacia komunumo.

Aldone ni rimarkigu, ke la supraj subtemoj estas laboraj titoloj, kiuj povas esti, laŭ intereso aŭ bezono, modifitaj: ili prezentas nur kadron por plifaciligi orientiĝon al interesitoj. Ankaŭ skribaj kontribuaĵoj bonvenus. En la sekvonta numero ni ankoraŭ iom pli detale prezentos la programon mem de la aranĝo. Indikojn pri partoprenkotizoj kaj ĝeneralajn aliĝkondiĉojn kaj informojn vi abunde trovos en la lastaj numeroj.


TURISMA KALENDARO KAJ KORESPONDO-BULTENOJ

Denove bonaj novaĵoj el Pollando: kvankam kompare malfrue — pro la ŝajna malemo de la organizantoj de junularaj aranĝoj kaj kunvenoj sufiĉe frue indiki siajn planojn kaj projektojn al la Turisma Servo de TEJO, ĉe PEJ en Gdańsk nia agema TEJO-estrarano pri Turismo, Servoj kaj Studentaj Aferoj, amiko Janusz Wolak, samtempe prezidanto kaj gvidanto de Pola Esperanto-Junularo, malgraŭ ĉiuj malhelpoj sukcesis komence de marto eldoni kun siaj kunlaborantoj "Turisman Kalendaron 1973 de TEJO". Kiel ĝi aspektas, montros al vi la apuda foto de ĝia titolpaĝo. Kvankam la Koresponda Servo de TEJO okupas sin pri tute alia afero, ni enkadre de la sama artikoleto traktu ĝin. La Korespondan Servon de TEJO prizorgas la samaj geamikoj, kiuj ankaŭ kunhelpis ĉe la Turisma Kalendaro. Ni do kaptu la bonan okazon danki al la amikoj el Junulara Rondo de Gdańsk, kiuj per aktiva helpo ebligis ne nur la eldonon de Turisma Kalendaro, sed ankaŭ de du adres-bultenoj de la Koresponda Servo de TEJO. Ili estas precipe



La studenta centro en Sarajevo: moderna kongresejo por la Internacia Junulara Kongreso de TEJO.

interesaj por tiuj, kiuj ŝatas havi leteramikon el Sovetunio, kies adresojn la bultenoj ĉi-foje donas. Ili, same kiel la Turisma Kalendaro, estas haveblaj ĉe: Turisma kaj Koresponda Servoj de TEJO, p/a F-ino Jadwiga Greger, ul. Kujawska 24, PL-81-862 SOPOT, Pollando.



DEJ DAŬRE AKTIVAS

Unu el niaj plej junaj sekcioj estas la malgranda Dana Esperanto-Junularo, nur lastjare akceptita kiel membro de TEJO. Ĝi tamen estas konata pro sia modesta sed krea laboro, kiu estas kelkrilate modela por konstruiĝanta grupo. En la kutima raporto pri aranĝoj, varbkampanjo, gazetarraportoj koncerne la agadon, kaj eldonado de propra asocia gazeteto, aldoniĝis ĉi-foje foto de kunveno, kiu temis pri afrika kulturo kaj tieaj politikaj kaj socialaj problemoj; prelegis en ĝi burundia amiko Justin Minani, kiu daŭrigas la studon en la franca universitato de Lyon.

ATINGIS NIN KOREA "JUNULO"

Jam sufiĉe ofte ni publikigis fotojn de aroj da amike ridetantaj junaj koreaj geesperantistoj. Tamen ĝis nun estis ĉiam nur fotoj kaj leteroj de kelkaj konataj gvidantoj. Nun por la unua fojo atingis nin belaspekta junulara organo "La junulo", prezentanta plurajn interesajn artikolojn kaj raportojn el la korea junulara movado. Ĝi bone montras, ke la korea movado certe meritas la kvalifikon "vigla".

Interesitoj pri la korea revueto turnu sin al: La redakcio de "La junulo", KorEJO, Sodemun P.O. Kesto 59, Seulo-120, Koreujo.



OFICIALA INFORMILO

N-ro 468, 1973-05-01

Prof. B. Popović

KOMUNIKO PRI ELEKTO DE PROF. B. POPOVIĆ KIEL VICPREZIDANTO DE UEA

Per cirkulero de la 12a de januaro 1973 la prezidanto informis la Komitaton, ke la funkcio de unu el la vicprezidantoj estas vaka. Pro la grandeco kaj graveco de UEA, kiel ankaŭ pro la neceso havi maksimume reprezentan Estraron ankaŭ el vidpunkto de geografia etendiĝo, li esprimis la opinion, ke por la Asocio estus utile plu havi 8-membran Estraron kun 2 vicprezidantoj. Li sugestis la nomon de prof. d-ro B. Popović, kiun la elektokomisiono en Londono estis proponinta kiel vicprezidanton de la Asocio, sed donis limdaton ĝis la fino de februaro ĉu por apogi la kandidatecon, ĉu por fari proponojn pri aliaj kandidatoj. Ĝis la fino de februaro 14 komitatanoj apogis la kandidatecon de prof. Popović. Neniu alia kandidato estis proponita.

Sekve, per la cirkulero de la 2a de marto la prezidanto voĉdonigis la Komitaton pri la sola kandidato. Al la Komitato estis faritaj du demandoj: 1. Ĉu vi konsentas, ke la Asocio plu havu 2 vicprezidantojn; 2. se la plimulto voĉdonos jese, ĉu vi elektas prof. d-ron Popović kiel vicprezidanton de UEA? La limdato por la sekreta voĉdono estis la 7a de aprilo. La nombrado de voĉoj okazis, laŭ la establita kutimo, en la C.O. la 14-an de aprilo en la ĉeesto de la direktoro de la C.O., 2 individuaj membroj kaj, en tiu ĉi kazo, unu membro de la Komitato. La rezultoj estas: entute voĉdonis 58 komitatanoj (unu el la plej grandaj nombroj en la historio de UEA okaze de skribaj voĉdonoj); al la unua demando 52 respondis jese, 5 nee, dum 1 sin detenis; al la dua demando 42 respondis jese, 11 nee, dum 5 sin detenis.

Sekve, prof. B. Popović estas elektita vicprezidanto de la Asocio. Li jam partoprenis la kunsidon de la Estraro, okazintan la 28an kaj 29an de aprilo en la C.O., kaj, kvankam tute nova en la Estraro, utile kontribuis al ĝia laboro.

La prezidanto

UEA TRANSPRENIS ELDONEJON TK

La eldonejo TK (Danlando) kaj la Libroservo de UEA anoncas la transprenon fare de UEA de tiu tuta eldonejo. Ĉiuj librostokoj kaj eldonotaj materialoj de TK estas jam transportitaj al Rotterdam. Tio signifas, ke la aliaj libroservoj, kiuj ĝis nun mendis la eldonaĵojn de TK en Danlando, bonvolu de nun sin turni nur al la Libroservo de UEA, kie ili ĝuos la samajn komercajn kondiĉojn, kiel por la eldonaĵoj de UEA mem.

Temas unuavice pri jenaj eldonaĵoj: *ABZ de amo*, *Struvelpetro*, *Vole* — *novele*, *Viktimoj/Sur sangatero* kaj *La Nobla Korano*. Krome, laŭ la interkonsento inter UEA kaj TK, aperos en Rotterdam la nun preparataj libroj *La granda kaldrono* (romano de John Francis) kaj *Je la flanko de la Profeto* (verko de Italo Chiussi, en la serio Oriento-Okcidento).

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Gonçalves Barbosa, W., Brazilo.
Doneis, A.F., Usono.

NOVAJ MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1973

249 J.R. Peixoto Laguna, 250 A. Rabelo, Brazilo. 251 R. Seddon, Britujo. 252 A. Linja, Finnlando. 253 M. Bonnafous, 254 F. Micoud, Francujo. 255 A. Mosch, F.R. Germanujo. 256 A. Viotto, 257 G. Viti, Italujo. 258 H.C. Nijboer, 259 H. Veenstra, Nederlando. 260 R. Bugge-Paulsen, Norvegujo. 261 M.A. Carver, Nov-Zelando. 262 F. Björklund, 263 A. Blid, 264 A. Eriksson, 265 I. Johansson, 266 T. Julin, 267 B. Lindström, 268 J. Lokna, 269 H. Lundin, 270 G. Mellberg, 271 A. Olsson, 272 C. Olsson, 273 E. Östling, 274 E. Rytenberg, 275 E. Schuldenfrei, 276 S. Stenström, Svedujo.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1973-08-15 neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Brazilo: Hugo Fóscolo, D kaj FD Pompéu; Jaddo Couto Maciel, FD Salvador; W.A. Francini, D kaj FD São Carlos; Elvira Fontes, FD São Paulo. **Francujo:** Simonne E. Combebias, D Biarritz. **F.R. Germanujo:** Tadros Megalli, D kaj FD Untergrafendorf. **Hungarujo:** István Bálint, D kaj FD Kecskemét; Georgo Csüllög, FD Vésztő. **Italujo:** Eber Bergonzoni, D Reggio Emilia. **Japanujo:** Ĵun-iĉi Ŝibajama, FD Nisinomiya. **Kanado:** Olga du Temple, VD kaj FD Sidney. **Nov-Zelando:** W.D. Harding, FD Christchurch. **Usono:** Jack Lesh, D Gustavus.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1972, Unua Parto, pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj).

Aŭstrujo: Wien (FD historio). **Brazilo:** Rio de Janeiro (FD bankaj aferoj). **Britujo:** Neath. **Danlando:** Skellingsted. **Finnlando:** Helsinki (VD), (FD edukado). **Francujo:** Mulhouse (FD edukado). **F. R. Germanujo:** Münsing. **Jugoslavio:** Beograd (VD); Kranj. **Kanado:**

ESPERANTO EN RADIO



Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francujo. Por aliaj detaloj vidu la aprilan numeron.

BRAZILLO. La programo "Sintezo de Esperanto" preparita en Sorocaba kaj ĝis nun dissendata de la stacio Rádio Clube de ĉi tiu urbo estas nun aŭdebla ankaŭ per pli forta sendilo en la tuta brazila teritorio kaj najbaraj landoj. La nove uzata stacio estas Rádio Difusora Hora Certa de Guarulhos per ondoj 205 m (1460 kcs), 90.23 m (3325 kcs). La disaŭdigo per ondo 278 m (1080 kcs) daŭras. Samaj horoj kaj tagoj por ĉiuj ondlongoj. La parolantoj en tiu programo estas s-ro Manoel Blas Garcia, delegito de UEA, sekretario de Sorokaba Esperanto-Klubo, respondeca direktoro de la radio-programo, s-ro Silvestre Bego, direktoro pri publikaj rilatoj de la programo, prof. Nelson Silveira, prezidanto de Esperanto-Asocio São Paulo, prof-ino Elvira Fontes, estraranino de Esperanto-Asocio, São Paulo, F-ino Heliana Lúcia da Cruz Correa, respondeca pri junul-fako de la programo. Ĉiujn korespondaĵojn oni sendu al "Sintezo de Esperanto, internacia lingvo", Caixa Postal 370, 18100 Sorocaba, SP, Brazilo.

POLA RADIO. Post kelkmonata silento, nova programo el la stacio Gdańsk estas dissendata ĉiun alternan vendredon de 23.10 ĝis 23.25 per ondo 1321 m (227 kcs). La elsendoj preparitaj de s-ro Józef Toczyski estas fakte distraj: muziko, ŝercoj, kuriozaĵoj ktp. kaj daŭras 15 minutojn; pola lingvo estas parte uzata. Ilia daŭro dependas de la nombro de leteroj de eksterlandaj esperantistoj. Deziroj, sugestoj, kritikoj estos bonvenaj, atenteme legataj kaj ricevos respondon sur la anteno. Oni skribu al Pola Radio, Esperanto-fako, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando.

RADIO ROMA nun uzas la jenajn ondlongojn: 50.08 m (5990 kcs), 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs); pli detalaj informoj aperis en la maja rubriko.

RADIO SOFIA. Horoj kaj ondlongoj indikitaj en la aprila tabelo ne plu estas ĝustaj; vidu informojn en la maja rubriko.

SVISA RADIO. Jen la ondlongoj uzataj dum la periodo majo-novembro: 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 19.44 m (15430 kcs), 16.86 m (17795 kcs), 13.94 m (21520 kcs) por la tagmeza programo, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 25.60 m (11720 kcs), 25.25 m (11880 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 19.44 m (15430 kcs) por la vespera programo. Ondoj de 13 m ĝis 25 m estas direktataj al Afriko. Samaj horoj kaj tagoj.

USONO. Radio-kurso konsistanta el 150 sonbendoj estas dissendata dum la nuna studjaro, je malsamaj periodoj, de diversaj lokaj stacioj en Usono. Ĉiu leciono daŭras 15 minutojn, la kurso daŭras 30 semajnojn pro dissendado kvin tagojn semajne. La stacioj en Columbus (Ohio), Portland (Oregon), Walla Walla (Washington), Tampa (Florida), Oxford (Ohio), Corvallis (Oregon), disaŭdigas tiun kurson verkitan de s-ino Robert L. Wills, 94 West Riverglen Drive, Worthington, Ohio 43085, Usono.

Sidney (FD edukado). **Nederlando:** Groningen (FD mezgrada instruado). **Nov-Zelando:** Dargaville. **Sovet-Unio:** Kiev (JD). **Svislando:** Bern (FD radio). **Usono:** Boulder City.

DONACOJ 1973 (Gld.)

Asocia kapitalo: Israelo: rento de heredaĵo Engelscher, 176,90. Sumo ĝisnuna: 616,90.

Ĝenerala kaso: Aŭstrujo: s-ino G. Breunlich, 17,50. Finnlando: A. Linja, 2,25. FR Germanujo: W. Oeste, 23,38. Hispanujo: J. Bedia, 1,02. Nederlando: P.A. Buijnsters, 1,68. Hindujo: S-ino Ŝ.B.DebGupta, 500,— (memore al S.P.DebGupta). Sumo ĝisnuna: 886,57.

Kampanjo 100 x 100 (por ke 100 personoj devigu sin donaci ĉiujare dum 3 jaroj ekde 1971 po 100,— gld. aldone al la kutimaj kotizoj kaj donacoj): Sumo donacita por 1971: 5 300,— gld. Sumo donacita por 1972: 6 600,— gld. Sumo ĝis nun por 1973: 3 304,17 gld.

Patronaj membroj A de TEJO 1973: 21 C. Minnaja, Italujo, 22 F-ino R. Triolle, Francujo.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

KUN RECIPROKA DANKO

S-ino Akiko Woessink-Nagata, kiu venis al la Centra Oficejo de UEA el Japanujo en 1968 kaj fariĝis redaktorino de la revuo *Esperanto* en 1970, retiriĝis el la ofico en la fino de aprilo 1973. Sekve la redaktaĵon reprenas, ek de ĉi tiu numero, la ĉefredaktoro d-ro Sadler.

De post sia edziniĝo en 1972, s-ino Woessink ne ĉesis dediĉi multajn laborhorojn al la revuo, kvankam tio signifis por ŝi ĉiutagan longan kaj lacigan veturadon. Ni deziras ĉi tie publike esprimi al ŝi sinceran dankon kaj aprezon pro ŝia sindona kaj konscienca plenumado de la malfacila redakta taskaro. Siaflanke, s-ino Woessink petis nin esprimi ŝian koran dankon al ĉiuj kontribuantoj — regulaj kaj okazaj — kun kiuj ŝi havis la plezuron rilati dum la lastaj jaroj, kaj al kiuj ŝi ne povas danki unuope.

ANONCETOJ

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (t.e. 1 internacia respondkupono). Pri la enhavo de la anonc(et)oj respondecas sole nur la anoncantoj.



Deziras korespondi:
Nấu thi quốc thể
(29-jara), 15 Công
trúông, Lam Són,
Saigon, Hotel
Caravelle, Suda
Vjetnamujo.

Samideanoj tutmondaj salutu amase novstarigitan Esperanto-klubon ĉe Fraŭlino Strapps, 13, Quilter Road, Felixstowe, Suffolk, Britujo.

Greneroj por la animo estas atentita serio en "Dia Regno". Vi nun povas ricevi ankaŭ duan parton ĉe Esperanto-Misio, Box 7, Östansjö, S-694 02 Hallsberg 2, Svedujo.

Libroj kaj broŝurojn elĉerpitajn proponas al vi je favoraj prezoj, el sia kolekto de duoblaĵoj, la Biblioteko Hodler de UEA. Petu liston kaj kondiĉojn ĉe: Biblioteko Hodler, UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Deziras aĉeti, interŝanĝi nudfotojn kun foto-amatoroj; Leif Heilberg, P.O. Box 22159, San Francisco, Ca 94122, Usono.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, Strib, DK 5500 Middelfart, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj kriplulojn de la tuta mondo. Skribu por nia bulteno.

Deziras korespondi:
Trần-Lý-Thánh-
Húóng (27-jara),
27B Phan-Đinh-
Phùng, (Tài-Chańh),
Saigon, Suda
Vjetnamujo.



Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA (2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario, Kanado) povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi kontraŭ 1 respondkupono kompletan liston de siaj programoj.


Ĉu vi serĉas malnovan terminaron? elĉerpitan bel-etraĵon? praverkon el la 19a jarcento? mankant-jarkolekton de malnova revuo? Demandu ĉe la Fotokopia Servo de UEA, kiu povas havigi al vi unuarangajn kserografiajn kopiojn el la Biblioteko Hodler. Prezo de unu kopio (= du paĝoj de mezformata libro): 0,30 gld. Sendokostoj 10%. Petante oferton, indiku klare la titolon kaj, laŭeble, la eldonjaron.

Ĉu vi jam sendis vian karton al: La Tago de Turku, Box 66, SF-20100 Turku 10, Finnlando? Vi povas gajni belegan pupon. Pli detale en maja numero.

Torben Kehlet transloĝiĝis 1973-06-01 al: Kildeaasen 22, DK-2840 Holte; tel. (01) 80 51 10.

S-ro Matti Montin, Ädelfors, S-570 15 Holsbybrunn, Svedlando, interŝanĝas p.m. el la tuta mondo.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton kaj afranki ĝin filatele, kio multe helpas al UEA finance. Dankon!



Deziras korespondi:
Doàng-Thi-Lôc (35-
jara), 27B Phan-Đinh-
Phùng, Saigon, Suda
Vjetnamujo.

Institucio Hodler '68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financon bazon de UEA. Detale informas la administrantino: f-ino M.H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

Alvacy Plauda, Poŝtokesto 182, 88800 Criciuma-SC, Brazilo, tutmonde korespondas.

Kolordiapozitivojn bonkvalitajn pri naturo, arto, historio, ktp. por ilustraj prelegojn deziras ricevi pianisto Roland Dupuis, Helgagatan 36 u. 13, S-116 58 Stokholmo, Svedujo. Rekompencos laŭdezire. Antaŭdankon.

Planlingvan literaturon vendas: Libroservo CDELI, Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler, FRG, tel. (06897) 78246.

Vendoprezo de "Hilelismo" 172 p. estas de nun \$3. Fondumo Esperanto.

El Popola Ĉinio

Esperanta Monata Ilustrita
Specimeno akirebla senpage

ABONTARIFO: 1 jaro £0,50 Kan.\$2,00 5,— gld.
2 jaroj £0,75 Kan.\$3,00 7,50 gld.
3 jaroj £1,00 Kan.\$4,00 10,— gld.

ABONU: Ĉe niaj perantoj en diversaj landoj
aŭ rekte ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-
Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio



PACKANTO

de N. Droz-Pacmovado (verkis N.D.)
por muzikigado (alegre!)

*Antaŭ la jaro dumil PACO ekestos.
Tiam la tuthomaro kore kantos:
Por ĉiam nun soldatoj malaperis,
Ĉar ĉie sur la Tero ĉiu kantis:
Ni estas la vivo, infanoj amataj.
Por la feliĉo de ĉiuj vivi
Ni volas, kaj fraton neniam mortigi,
Nek ofendi, nek trompi nek ŝteli.
Kune kun ni volas esti la Gloro de DIO,
Per SIA amo ĉiun fraton feliĉigi!*

SVISLANDO

La 14a Eŭropa Ferio-Semajno (EFS) okazos de la 2a ĝis la 8a de septembro 1973 sur Fürigen apud Stansstad ĉe la Kvarkantona lago (Vierwaldstättersee). Ĝi prezentos gvidatajn ekskursojn variajn, Esperanto-lecionojn diversgradajn, vesperajn aranĝojn distrajn, ktp.

Petu senpagan programon kun detalaj informoj ĉe la organiza adreso: Ernst Glättli, Laurstrasse 17, CH-5200 BRUGG (Svislando).

cial

LA KONATA LINGVO-INSTITUTO
EFEKTIVIGOS

EN JULIO (2/11) KAJ AŬGUSTO (20/31)

**INTERNACIAJN
ESPERANTO-KURSOJN**

ĈE LA SUDA MARBORDO

EN RAVA KAJ LUKSA

FERIOPARADIZO

venu amase
KAJ SKRIBU

AL
D-ro CORREIA COIMBRA

VILAMOURA

ALGARVE

PORTUGALIO

De la 1-a de Julio ĝis la 9-a de Septembro

LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kastelo Grésillon

F-49150 BAUGE, Francujo

en kadro de bela Anĵu-regiono, proponas al vi
komforton, somerajn ĝuojn, parkon, lageton,
distrojn, interesajn ekskursojn, kaj

ELSTARAJN ESPERANTISTAJN AKTIVAĴOJN
dispartigitajn en kvar periodoj:

7/1 – 22 Kulturaj Esperantistaj Semajnoj
Diversgradaj kursoj, preparado al
ekzamenoj. Korbofarado, librobindado,
emajlado

7/22 – 8/5 Internaciaj Semajnoj
Prelegoj, debatoj, konversacioj

8/5 – 26 Studsemajnoj
Diversnivelaj kursoj, preparado al
ekzamenoj. Flankaj aktivaĵoj
(librobindado, ktp...)

8/26 – 9/9 Du Kulturaj Semajnoj
Kursoj, praktikado de la lingvo
ELEKTU – RAPIDE ALIĜU

Pliajn informojn oni petu je ĉi-supra adreso.



JUGOSLAVIA VOJAĜAGENTEJO


DEZIRAS AL VI PREZENTI BELAĴOJN DE
JUGOSLAVIO PER LA EKSURSOJ:

I

BEOGRAD — KRALJEVO — ĴIĈA (ŽIĈA) —
MATARUŜKA BANJA — STUDENICA — BEOGRAD

Daŭro: 2 tagoj. Ekiro la 4-an de aŭgusto posttagmeze

Fresko el Studenica




II

BEOGRAD — OVĈAR BANJA — BEOGRAD

Daŭro: 2 tagoj. Ekiro la 4-an de aŭgusto posttagmeze

Ovĉar banja



III

BEOGRAD — PRIŜTINA — GRAĈANICA — PEĈ
(Serbio) — DEĈANI

Daŭro: 3 tagoj. Ekiro: la 5-an de aŭgusto matene

La patriarkejo de Peĉ



IV

BEOGRAD — LAGOJ DE PLITVICE — PRIMOŜTEN

Daŭro: 3 tagoj. Ekiro: la 5-an de aŭgusto matene

Plitvice



V

BEOGRAD — SKOPJE — STOBI — PRESPANSKO
JEZERO — OHRID — MAVROVO — SKOPJE —
BEOGRAD

Daŭro: 4 tagoj. Ekiro: la 5-an de aŭgusto matene

Ohrid

Anonco kun enpago plej malfrue: la 29-an de julio je la 10-a horo.

Se por ekskurso ne anoncos sin minimume 35 personoj, ekskurso ne povos okazi.